



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

8

1972



Kora zorgo

Foto de Gang Jihjue

Elektitaj Fotoj Faritaj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo

Ĵong Guanhiu, patrino de la popolaj armeanoj

Foto de Ĉeng Hajking





“Samfamilianoj”
Foto de Vang Ĉen

ĈPLA-anoj modeste
lernas de laboristo.
Foto de Bo Haj






Korverša interparolo

Foto de Vang Gjuhing




Transpasi ravinon

Foto de Gôu Ji





Marfrontaj gardostarantoj
Foto de Vu Lihin



Milicanoj sur lago
Foto de Ĉen Ŝubo



Al fiŝato

Foto de Lian Ĉi



Ordinaraj laborantoj
Foto de Vang Bin





Eksplodigu

Foto de Vu Zikuan

ĈPLA Lernas de la Tutlanda Popolo

LERNI DE LA POPOLAMASOJ

La instrukcio de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ pri tio, ke la Ĉina Popola Liberiga Armeo devas lerni de la tutlanda popolo, havas tre gravan signifon por plifortigi la konstruadon de la armeo.

Iu trupo de ĈPLA origine estis regimento de la Ruĝa Armeo organizita en 1928. Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ĝi kreskadis flegate de la popolamasoj en la pasintaj dekoj da jaroj. En la militaj jaroj, ĝi firme sin apogis sur la popolo, modeste lernis de ĝi kaj pro tio tre bone plenumis siajn batalajn taskojn.

En septembro de 1945, tiu regimento partoprenis en la kampanjo ĉe Ŝangdang por frakasi la furiozan atakon de kuomintangaj trupoj al la Liberigita Regiono. Antaŭ la batalo, multaj kompanioj petis popolanojn rifuĝintajn el distriktoj okupitaj de la malamiko, ke ili akuzu la kuomintangajn reakciulojn pri la teruraj krimoj en kruela subpremado al la popolo, kaj per tio vekis brulan malamon en la komandantoj kaj batalantoj kontraŭ la malamiko. Post la komenciĝo de la batalo, laŭte kriante la sloganon "Defendu Prezidanton Maŭ, liberigu la suferantajn laborulojn!" la batalantoj brave sturmis, rapide konkeris Laŭjeling kaj aliajn 6 fortikigitajn punktojn de la malamiko kaj sukcese plenumis sian taskon en sieĝo de malamika punkto kaj atako al ĝia helpa trupo. Dum persekutado de la forfuĝantaj malamikoj, ili komplete ekstermis la 19-an Armeon de Ĉiang Kajŝek kaj kaptis ĝian armeestron, dank' al energia helpo de la amasoj kaj kunagado de frataj trupoj. La historio de batalo komprenigis al la komandantoj kaj batalantoj de tiu regimento la veron, ke la popolamasoj estas la fonto de fortoj por ĈPLA por venki la malamikon. Nur sin apogante sur la amasoj kaj lernante de ili, la armeo de la proletaro povas disvolviĝi kaj ĉiam pli fortiĝi en batalado.

En la periodo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, la komandantoj kaj batalantoj de tiu regimento ripetfoje lernis la instruon de Prezidanto Maŭ pri lernado de la popolamasoj, ofte petis laboristojn, malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kaj revoluciajn kadrojn lekciigi al ili, okaze de ilia kampado aŭ plenumado de tasko en aliaj lokoj. Tio multe altigis ilian konscion pri klasbatalo, batalo inter la du linioj kaj daŭra revolucio kaj plibonigis la kvaliton de la trupo en politiko kaj militaj aferoj.

Dum sia longa praktikado en lernado de la popolamasoj, la komandantoj kaj batalantoj komprenis el sia propra sperto, ke fiŝo ne povas vivi sen akvo kaj armeo povas fari neniun paŝon, se ĝi disiĝas de la popolo. Nur per persistema kaj modesta lernado de la amasoj, oni povas teni la proprajn kvalitojn de ĈPLA kiel armeo de la proletaro, tiel ke ĝi ĉiam venke marŝu antaŭen laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

LERNADO DE DIREKTORO VANG

Hju Ĉundong, estro de la proviza sekcio de iu regimento de ĈPLA en Ginan-regiono, ĉiam rigardas lernadon de la popolamasoj kiel movforton en sia progresado.

Foje, la trupo venis al iu loko en sia marŝado. Hju Ĉundong aŭdis, ke 15 kilometrojn for de la etapo sin trovas iu direktoro Vang de komerca kooperativo, kiu stimulis per sia bona ekzemplo la laborantojn tutkore servi al la amasoj, kaj la kooperativo estas tre ŝatata de la lastaj. Kamarado Hju Ĉundong tuj petis informon pri la vojo kaj venis al la kooperativo. Apenaŭ li eniris ĝin, li vidis ke iu maljuna kamarado kun blanka mantuko sur la kapo estis ironta el ĝi puŝante ĉareton plenan de varoj. Li tuj rapidis al la lasta kaj demandis: "Ĉu direktoro Vang estas ĉi tie?" Aŭdinte tion, la maljunulo respondis kun rideto: "Kion vi volas, kamarado? Tio estas mi." Premante la manon de

Vang, Hju Ĉundong diris al li sian intencon. Vang entuziasme kondukis lin en la oficejon, donis al li tason da akvo kaj ripetfoje klarigis al li modeste, ke li faris tre malmulte kaj havas nenion preparolindan. Hju Ĉundong devis sin turni al laborantoj de la kooperativo kaj la lokanoj por peti informojn kaj la lastaj rakontis al li multajn rimarkindajn farojn de la direktoro. Kamarado Vang partoprenis en la revolucio frue en 1938. Antaŭ kelkaj jaroj, la gvidantoj admonis lin emeritiĝi pro lia malforta sano. Sed li insistis pri neiro al la hejmo por pasigi la maljunecon kaj petis permeson labori kiel "ekstra" komerca laboranto kaj ankoraŭ diligente servadis sur la komerca fronto. Li bone scias, kion bezonas ĉiu ajn vilaĝo de la komunumo. Foje, kiam iu produkta grupo devis sterki siajn kotonkampojn, ĝiaj membroj trovis, ke elĉerpiĝis ilia kemia sterko kaj pro tio ili tre maltrankviliĝis. Ĝuste tiam Vang ŝvitegante alportis kemian sterkon al ili per puŝaro. Aliffoje, li ekmemoris, ke preskaŭ elĉerpiĝis la insekticido de iu vilaĝo, li tuj portis ĝin rekte al ilia kampo per sia ĉaro kun pezo de ĉ. 50 kilogramoj, malgraŭ laciga piedirado de ĉ. 15 kilometroj. Ĉiuj liaj faroj forte tuŝis la koron de Hju Ĉundong: Kiel bonan ekzemplon li donis al ni armeanoj!

Post lia reveno, forta emocio regadis la koron de Hju Ĉundong. Refoje li studis la instruon de Prezidanto Maŭ pri lernado de la popolamasoj kaj sentis ĝin tiam aparte kara. En la sekvanta tago, li prezentis en plena kunsido de la sekcio la lernindajn farojn de direktoro Vang kaj alvokis siajn kamaradojn tutkore servi al la batalantoj laŭ la ekzemplo de lokaj komercaj laborantoj. Ĉiuj kunvenantoj estis inspiritaj de la bona ekzemplo.

Foje, dum Hju Ĉundong laboris en la kuirista subplotono de la sepa kompanio, li trovis ke kuiristoj ne povas samtempe porti surdorse kaldronon kaj tornistron, kio malfaciligas ilian marŝadon. Li ekmemoris la modelajn agojn de la kooperativa direktoro Vang kaj decidis lerni de li en praktiko. Li iris en la tenejon kaj cerbumis por solvi la problemon de portado de tornistro kaj kaldrono. Post provo, li sukcesis refari framon por portado de oleujo en portilon taŭgan por porti du tornistrojn. Li portis la faritajn portilojn al la kuirista subplotono de la sepa kompanio kaj tiel solvis ĝian problemon.

LERNI LA SPIRITON DE SINAPOGO SUR PROPRAJ FORTOJ DE LA LABORISTOJ

Batalantoj de iu aerarmea trupo en Ŝanhajo loĝis najbare de iu fabriko. Ĉiufloje, kiam ili paro-

lis pri riparo de sia manĝejo, ili diris kun profunda revolucia sentimento: "Ni neniam forgesos la profundan instruon kiun la laboristoj donis al ni."

La manĝejo de tiu trupo estis konstruita el tabuloj kaj gudritaj kartonoj. Ĉar la kartonoj ŝiriĝis post longa uzado, ĉiufloje, kiam pluvigis, pluvetis ankaŭ en la ĉambro. Iu kamarado diris al Vang, kiu respondecis pri tia afero: "Prezentu peton al la gvidantoj, ke ili donu al ni iom da materialo por riparo." Vang pensis: "Jes, la manĝejo bezonas riparon, sed kiel ni faru ĝin?"

En ilia najbareco loĝis kamarado Gin, sekretario de la partia filio de la fabriko. Post sia deĵorado, li ofte interparolis kun batalantoj pri la fabriko. Foje, li rakontis al ili la historion de la fabriko.

La fabriko elvolviĝis el origina aĉetejo de eluzitaj objektoj. En la jaro 1958, sub la direktado de la ĝenerala linio persone ellaborita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ "**streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie**", sep laboristoj fondis metiejon por produkti per karboforno utilajn objektojn. En la pasintaj dek kelkaj jaroj, ili turnis la malgrandajn metiejojn en fabrikon kun ĉirkaŭ cent laboristoj. Nun ili funkciigas sian fabrikon ankoraŭ kun la revolucia spirito de diligentece kaj ŝparemo kaj penema lukto en malfaciloj.

La vortoj de Gin ĉiuj penetris en la koron de la batalantoj. Post lia foriro, ili komencis varman diskuton. Iu kamarado diris: "Por ŝpari elektron, la laboristoj uzas malpli multe konsumajn ampolojn kaj eĉ uzas akvon kun ŝparemo. Tio spegulis ilian profundan amon al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj estas lerninda por ni." Alia kamarado diris: "Mi opinias, ke ni povas ripari la manĝejon per niaj propraj manoj."

Kaj ili tuj ekagis. Vang kaj aliaj kolektis uzitajn brikojn, tegolojn kaj ladopecojn kaj komencis mem ripari la manĝejon. Iuj maljunaj laboristoj ilin helpis malgraŭ sia okupateco. Post streĉa laborado en kelkaj tagoj, fine ili renovigis la manĝejon sen elspezo de mono, tiel ke ĝi alprenis plaĉan aspekton.

POR LERNI SPERTON

En la naŭa kompanio de iu trupo de ĈPLA cirkulas anektodo pri la politika vicdirektanto Jin Ĉuanlu, kiu lernis modeste de Kju Ĵipeng, sekretario de la partia filio de Sang-juan-brigado.

En la tago, kiam Jin Ĉuanlu vizitis Kju Ĵipeng por lerni lian sperton, la lasta estis faranta adobojn kaj portanta brikojn kune kun komunumanoj. Iu kadro de Sang-juan-brigado prezentis al Jin avangardajn farojn de Kju Ĵipeng: Post kiam li fariĝis kadro, li neniam forlasis fizikan laboron kaj ĉiam ligiĝas kun la amasoj koron kun koro. En la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo, li ofte reformis kampojn kune kun la komunumanoj, hakante rokojn, plenigante krutajn torentvaletojn kaj konstruante barojn al rivero. Li estis alnomata de la komunumanoj "intimulo". Jin Ĉuanlu estis multe inspirita.

Reveninte al la kazerno, Jin Ĉuanlu enprofundiĝis en plotonojn kaj subplotonojn, donante bonan ekzemplon en lernado kaj plenumado de diversaj servoj. Li pensis ke li jam faris kion li devis, sed la batalantoj ankoraŭ ne kontentis pri lia laboro. Li pensis, ke ĉiutage li vivas, laboras kaj lernas kune kun la amasoj, same kiel Kju Ĵipeng, sed kial la batalantoj ankoraŭ malkontentas pri li? Li decidis denove viziti Kju Ĵipeng en Sang-juan por peti de li instruon.

Jin Ĉuanlu kaj Kju Ĵipeng intime interbabilis. Li diris al Kju Ĵipeng la opiniojn de la batalantoj kaj la problemon en sia penso kaj petis helpon de li. Kju Ĵipeng diris sian komprenaĵon pri strikta interligiĝo kun la amasoj kaj konsilis kore: "Ni profundiĝas en la amasojn ne nur por solvi problemojn de ili kaj helpi ilin en ideologio kaj politiko, sed ankaŭ lerni de ili kaj remuldi nin mem. Nur tiamaniere, ni povos vere interligiĝi kun la amasoj koron kun koro!" La vortoj de Kju Ĵipeng lumigis lian penson. Li ekkomprenis, ke kvankam ĉiutage li kunestas kun la batalantoj, li tamen ne modeste lernas de ili.

De tiam, Jin Ĉuanlu lernadis la bonaĵojn de la batalantoj kaj korektadis siajn difektojn. Kun varma koro li interparolis kun ĉiu el siaj batalantoj kaj helpis ilin laŭbezzone en solvo de malfaciloj. Kaj batalantoj tre volontis malkovri antaŭ li sian koron. Tiamaniere, Jin Ĉuanlu akiris pli multe da informoj pri la medio, gajnis bonon el sia lernado de la amasoj kaj ekpovis plenumi siajn ideologiajn kaj politikajn laborojn ankoraŭ pli efike.

PORTOVEKTO DENOVE EN SERVO

*"La portovekto longas nur unu metron pli,
Mi pezan ŝarĝon portas por la revoluci",
....."*

Vektoportante legomojn, Fu Dajgen, kiu respondecas pri provizoj de la kompanio, gaje kantas

dum irado. Vidante tion, liaj kamaradoj pretervole ekpensis pri la instruo kiun li ricevis de la vektoportista taĉmento de la vilaĝo Nancujĝuang.

Kiam Fu Dajgen servis kiel proviantisto, li havis flavan bambuan portovekton. Tiam li ofte portis per ĝi mangaĵojn kaj trinkaĵojn por siaj kamaradoj aŭ transportis objektojn aĉetitajn en foiro malproksima je dekoj da kilometroj. La kamaradoj diris, ke la portovekto estas lia "malnova kunulo". Poste, li estis promociita al la posteno de respondeculo pri provizado de la kompanio, kiu translokiĝis de montvilaĝo al urbo. Tiam, kiam li iris sur strato portante objektojn per vekto, li sentis ĝeniĝon. Kaj fine li metis la portovekton en tenejon.

Foje, la tria mitrala kompanio iris al la vilaĝo Nancujĝuang por partopreni fizikan laboron. La maljuna sekretario Ĝang Huajde de tiu vilaĝo uzis glatan portovekton, kiu estis aparte okulfrapa. En ripoza horo, Fu Dajgen proksimiĝis al la maljuna sekretario, sidiĝis apude kaj demandis lin mallaŭte: "Ĝam multajn jarojn vi uzadis la vekton, ĉu ne?" La maljunulo prenis la vekton en sian manon kaj komencis varme rakonti pri ĝi. En 1952, bone observante la instruon de Prezidanto Maŭ pri persistado en la socialisma vojo, 11 familioj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de Nancujĝuang fondis interhelpan grupon. Tiam la grupo havis nur 7 azenetojn kaj 4 lignajn ĉaretojn. En okupoplenaj sezonoj, la grupanoj devis transporti sterkon al kaj rikoltaĵojn de la kampoj per vektoj. Pro tio, oni moke nomis la grupon Vektoportista Taĉmento. Tamen sinapogante sur propraj fortoj kaj peneme luktante en malfaciloj, la interhelpa grupo gajnis venkojn unu post alia. Kiam la rakontado venis al tiu punkto, la maljuna sekretario ekfrapetis la ŝultron de Fu Dajgen kaj diris: "En la estonto ni plue disvolvos la revolucion spiriton de la Vektoportista Taĉmento por fari nian kontribuon al la socialisma konstruado!"

La vortoj de la maljuna sekretario memorigis al Fu Dajgen la portovekton, kiun li metis en la tenejon. Pensoj bolis en lia kapo: Li vivadis en kamparo kaj kutimis al vektoportado de sia knabeco, sed post kiam li fariĝis kadro kaj translokiĝis en urbon, li eksentis ĝenon je uzo de portovekto. La formeto de la portovekto ja signifas ŝanĝiĝon en ideologio.

Reveninte al la oficejo de la bataliono, Fu Dajgen rapidis al la tenejo, elprenis la bambuan portovekton kaj forviŝis la polvon sur ĝi. De tiam ĝi denove fariĝis lia "malnova kunulo".

Heredigi Bonan Tradicion

Ĉi tie ni rakontas al la legantoj, kiel Hju Guoĝu, vicregimentestro de la Sudmara Floto de la Mara Armeo, entuziasme kulturis novajn kadrojn.

En tago, kiam vicregimentestro Hju venis al la kvina kompanio por koni iradon de la laboro, li aŭdis plendon de batalantoj: “Fajro flamiĝas, nur se multaj homoj kune kolektas kaj almetas brullignon; tamen nia nova kompaniestro mem kolektas kaj bruligas brullignon.” Post enketo li konstatis la fakton. Kompaniestro Ven Ĝihin havas altan entuziasmon por la kompania konstruado, tamen li ne tiel kredas amasojn kaj malofte interkonsiliĝas kun ili. En la daŭro de tri monatoj li kunvokis nur unu kompanian kunvenon. Vicregimentestro Hju pensis en si, ke tiamaniere li ne povas strikte unuiĝi kun batalantoj, disvolvi ilian aktivecon kaj bone konstrui la kompanion.

Tiam la kvina kompanio ricevis urĝan taskon de milita trejnado. Ĉiuj aliaj kadroj de la kompanio forestas pro afero, Ven tre maltrankviliĝis pensante: “Mi neniam manipulis la nove disponigitan kanonon. Kiu povas instrui al soldatoj kaj kiel oni faros trejnadon? Ĉu la tasko povos esti plenumita en 15 tagoj?” Vicregimentestro Hju diris: “Senutila estas via maltrankvilo. Nia malnova kompaniestro ne tiel agis!” Ĉe tio li rakontis anekdoton pri la malnova kompaniestro: En la periodo de la Liberiĝa Milito, foje, la kompanio ricevis ordonon ekstermi banditojn en mallonga tempo. Tiam la kuomintangaj banditoj jam sin kaŝis en profundaj montoj. Kion fari? La malnova kompaniestro kunvokis kompanian kunvenon por peti opiniojn de la subplotonestroj. Post konsiliĝo ili elpensis bonan ideon iri en aspekto de banditoj al la bandita nesto.



Vang Hiangji, la sekretario de la partia komitato kaj politika direktanto de la Unua Regimento de Ginan de ĈPLA, helpas soldaton ordigi la tornistran antaŭ iro al trejnado.

Tiamaniere ili ekspedis nur unu subplotonon, kiu kaptis la ĉefon de la banditoj en kelkaj tagoj kaj plenumis la taskon. Finrakontinte Hju diris al kompaniestro Ven: “Nun la tasko estas peza, ni lernu la labormanieron de nia malnova kompaniestro kaj kunvoku kompanian kunvenon por peti opiniojn de la subplotonestroj.”

Vespere la kunveno iris tre vigle. Post kiam vicregimentestro Hju rakontis la nunan situacion kaj taskon, pli ol dek subplotonestroj konkure elpaŝis por helpi la kompaniestron en la laboro. Kvin subplotonestroj, kiuj lernis manipulado de la nova kanono en la regimento, fervore donis konsilojn al la kompaniestro. Aŭskultinte ĉion ĉi tion, kompaniestro Ven pensis: “Hej, kiel bonaj estas la opinioj de kamaradoj! Kial mi ne pli frue petis de ili opiniojn?” En la sekvanta tago, sur ekzercejo levigis alta tajdo de reciproka instruado de oficiroj kaj soldatoj. En la sesa tago, sub la komando de Ven la tuta kompanio jam povis manipuli la novajn kanonojn.

Tamen en la naŭa tago, kiam vicregimentestro Hju revenis de kunveno de la regimento, li informiĝis, ke kompaniestro Ven denove apartiĝis de la amasoj. Li do iris al Ven por fari korverŝan interparolon. La lasta diris: “La tekniko de la kamaradoj por manipuli la novan kanonon estas ankoraŭ ne bone bazita, ĉu la tasko povas esti plenumita en la mallonga tempo?” Vicregimentestro Hju diris: “Kiam vi ne trovis rimedon por solvi la malfacilon, vi imitu nian malnovan kompaniestron kaj kunvoku kompanian kunvenon por aŭskulti opiniojn de la kamaradoj.”

La dua kompania kunveno iris ankoraŭ pli arde. La subplotonestroj elmetis novan projekton por fari teknikan ekzercon. Aŭskultante Ven sentis, ke varma fluo trakuris lian korpon. “Kiel bonaj estas la kamaradoj! Kial mi denove apartiĝis de ili?” li pensis en si. Hju studis kune kun Ven verkon de Prezidanto Maŭ kaj helpis lin kompreni la veron, ke **la amaso estas vera heroo**, lige kun praktiko de kunvoko de la kompania kunveno kaj milita trejnado. Dank’ al tio kompaniestro Ven komencis memkonscie konsiliĝi kun la amasoj en laboro.



Jang Fenghiang (dekstre), vickompaniestro de la Pekina Trupo, interŝanĝas sperton de pafado kun soldatoj.

Post kiam Hju venis al la komandea kompanio, li aŭdis diron de soldato: “La vorto estas bela, sed ne plenumita. Kial do oni faris la konsenton.” Pri kio temas tio?

Duono de kamaradoj de la komandea kompanio estis plenumanta taskon sur monto. La kuirista subplotonon ĉiutage devis porti manĝaĵon al ili, tial la laboro estis tre peza. La kadroj de la kompanio alvokis la kamaradojn zorgi kaj helpi la kuiristan subplotonon kaj esprimis, ke ili alterne laboros en kuirejo, heredante kaj disvolvante la gloran tradicion de ĈPLA. Sed ili ne efektivigis la diron.

En matena krepusko de la sekvanta tago, Hju venis al la kuirejo kaj deprenis vektoron de soldato Vang Ŝaŭhua, dirante: “Hodiaŭ vi ripozu, mi transportu manĝaĵon.” Pensante la 40-kilograman manĝaĵon, la du transirotaĵoj kun tiel mallarĝa kaj kruta vojo sur kiu oni ne povas ripozi, Vang Ŝaŭhua maltrankvile diris: “Vicregimentestro, vi ne kompetentas!” “Kial mi ne kompetentas?” diris Hju. Ne povante deadmoni lin, Vang Ŝaŭhua postsekvis lin ĝis la montpiedo. Portante pezan ŝarĝon Hju firmpaŝe ascendis la monton. La konduto de Hju profunde kortuŝis la kompaniajn kadrojn.

De tiam la kadroj persistis en partopreno de la kuirista laboro. La kadroj konkure petis por transporti manĝaĵon sur monton. Ili laboras, lernas kaj interŝanĝas korajn vortojn. En tio vicdirek-

tanto Gaŭ Van-an estas bona ekzemplo. Iun posttagmezon subite ruliĝis griza nubo kaj torrentis pluvego. Vespere ekblovigis 9-grada tajfuno, kiu noktomeze fariĝis 12-grada. Tiam vicdirektanto Gaŭ ekpensis, ke pajla domo de la kuirista subplotono en malalta loko certe sin trovas en danĝero, tial li surmetis pluvmantelon kaj rapidis al la kuirejo. Atinginte la lokon li trovis, ke la kuiristoj batalis kontraŭ ventego kaj pluvego. Akvo preskaŭ fluis en la domon, postmuro kliniĝis, la ventego puŝis pajlojn sur la tegmento en amasetojn kaj la pluvakvo enpenetris en la domon. Vicdirektanto Gaŭ gvidis kamaradojn por fortikigi muron, ŝtopi truojn, translokigi materialojn kaj fine venkis la ventegon post batalado de du horoj.

Antaŭ forlaso de la kompanio Hju okazigis kunvenon por peti kritikojn al si. Kvankam la kunveno iris tre arde, tamen neniu elmetis al li kritikon. Post finiĝo de la kunveno li ekmemoris la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Diri, ke en nia laboro kvazaŭ ĉio iras bone, tio ne kongruas kun la fakto. Ne ĉio iras bone, ekzistas ankoraŭ difektoj kaj eraroj.”** Li pensis en si: “Kiel mi povas havi nenan mankon! Kvankam mi rakontis al la novaj kadroj bonan tradicion de malnovaj kompaniestro kaj plotonestroj, kiuj ĉiunokte iris rigardi la dorman staton de batalantoj, tamen mi neniam mem gvidis ilin fari tion. Iu batalanto diris, ke dum la nokta rigardado paŝbruo de plotonestro vekigis ilin. Ĉu tio ne montris, ke mi ne bone atentigis lin? Kial kamaradoj ne elmetis al mi kritikojn?” Ĉe tio, li ne povis sin kvietigi. Li decidis refoje kunvoki kunvenon. En la dua kunveno li unue eldiris siajn mankojn kaj sincere petis de kamaradoj kritikojn. Kortuŝite de lia sincereco la kamaradoj elmetis ĉiujn opiniojn.

Vicregimentestro Hju ĉiam mezuras sian konduton kaj edukas kadrojn per postuloj de la Partio.

Foje, Hju venis al brikofarejo kaj informiĝis, ke oni ofte malfruigis la tempon por manĝo. Li pensis, ke en la lastaj du jaroj direktanto Deng donis relative grandan zorgon al batalantoj, nun la laboro estas tre peza, kial oni malfruigis la tempon por manĝo? Demetinte la jakon kaj suprenvolvinte la pantalon-tubojn, li iris labori kune kun batalantoj. Dum la laborado li informiĝis, ke Deng estis ofte laŭdata pro sia bona unuiĝo kun kaj multa zorgo al soldatoj de la kompanio. Pro tio aperis ĉe li memkontenteco, kaj li ne tiel multe donis la zorgon.

Vicregimentestro Hju diris al Deng: “Zorgi batalantojn estas heredi kaj disvolvi la gloran tradicion de nia armeo kaj plenumi armeokonstruan linion de Prezidanto Maŭ. Eĉ se ni tion faris bone, ni ne devas memkontentiĝi. Ni devas vidi, ke nia laboro postulas al ni pli da klopodo.” Li pacience helpis Deng koni sian mankon el opinioj de la soldatoj kaj kune kun li studis instruojn de Prezidanto Maŭ pri modesteco. Deng sentis, ke ĉiuj vortoj de Hju trafis lian koron.

De tiam Deng pli zorgis batalantojn. Foje, la pordo de la brikobakejo en bakado difektiĝis kaj subite defalis kelkaj brikoj. Se oni ĝin riparus ne rapide, la pordo disfalus., la bakejo kaj ĉiuj brikoj en bakado fariĝus senutilaĵoj kaj eble okazus akcidento. La ĉelokaj batalantoj sin anoncis por ĝin ripari. Pensante, ke la bakejo estas jam en flamo kaj la riparo estas ja danĝera, Deng diris al batalantoj: “Mi iru, vi observu!” Li verŝis akvon sur sian pajlan ĉapelon kaj laborkostumon kaj alkuris por riparo. Pro la alta temperaturo li kapturiniĝis kaj larmis senĉese. Post du minutoj liaj vesto kaj ĉapelo jam sekiĝis de la bakado. Li do reiris por akvoerŝado kaj persistis en laboro. Post tiaj iro kaj reiro de dekelkaj fojoj, li finriparis la pordon. Lia konduto tre kortuŝis la batalantojn.



Deng Junming (maldekstre), vicestro de la Pekina Trupo, intime interbabilas kun soldatoj de traktora subplotono.



Klara Fonto

sur Insuleto

ĈE la fronto de nia Orienta Maro troviĝas insuleto en formo de salikofolio, sur kiu loĝas 13 familioj. Pro la mardefenda bezono, unu taĉmento de ĈPLA, sub la gvido de plotonestro Liu Ginghaj, venis al la insuleto por tie garnizoni.

Tuj post sia surteriĝo, la taĉmento sin ĵetis en la streĉan defendkonstruadon dank' al la subteno de la insulanoj. Plotonestro Liu pensis en si: La supera instanco sendis nin ĉi tien por defendi kaj konstrui la insuleton. Por akiri venkon, ni nepre devas strikte unuiĝi kun la insulanoj. Tamen, unu problemo maltrankviligis lin: Sur la insuleto troviĝas nur unu puteto, kiu povas provizi nur la 13 familiojn per sia akvo. Post kiam la taĉmento suriris la insuleton, la akvoprovizo fariĝis nesufiĉa. Sed, mirindaĵo ja okazis: La puteto ĉiam estas plena en la lastaj tagoj. Liu meditis: La puteto estas en la orienta fino de la vilaĝo, la insulanoj devas preterpasi la pordon de la taĉmento por porti akvon. Kaj kial ni ne vidis ilin en la lastaj tagoj? De kie ili akiris akvon? La plotonestro decidis malkaŝi tiun sekreton.

Li trairis la vilaĝon kaj demandis multajn homojn, sed la lastaj ĉiuj diris kun rideto: "Ni havas akvon, la putoakvo restu por via uzo!" Li demandis kaj demandadis, sed la sekreton li ne malkaŝis. Poste, li vizitis ĉiujn familiojn unu post alia kaj trovis, ke en iliaj akvovazoj restas akvo, tamen ne multa. Kial? Subite, li rimarkis, ke onklo Feng iras al la norda vojeto vektoportante sitelojn. Tuj leviĝis demandsigno en lia kapo, kaj li do sekvis la onklon senbrue.

Transpasinte monteton, plotonestro Liu venis al la nordo de la insuleto laŭ nova zigzaga vojeto formita de homirado. Tiam li rimarkis ke la onklo sin turnis kaj malsupreniris al la marbordo.

Atinginte la montpiedon apud la maro, plotonestro Liu surpriziĝis. Li vidis, ke apud la lazura maro staras klifo, sur kiu rokego kiel bovkapo etendas super la maro, kaj sube iu 11-12-jara knabino kun ruĝa kravato sidas serioze legante libron. Apud la knabino viciĝas steloj, al kiuj klara fonto fluas el la klifofendo. Ĉu la knabino ne estas Hajhong, la nepino de onklo Feng? Tiam la onklo venis al la klifo, vicigis siajn sitelojn post aliaj kaj sidiĝis sur iu ŝtono. Li diris: "Kantu por mi, Hajhong, revolucionan modelan pekinoperon." "Kiun kanton vi volas?" kun rideto demandis Hajhong kapolevante.

"Nu, la kanton Intima Rilato inter la Armeo kaj Popolo kiel Tiu inter Fiŝo kaj Akvo."

"Jes," Hajhong fermis la libron, kaj ridis kun du kavetoj sur ŝia vango. Ŝi saltis sur alian ŝtonon kaj ekkantis per sonora voĉo vizaĝe al la murmuranta fontakvo. . .

La afero staras tiel: Antaŭ kelkaj tagoj, kiam disvastiĝis la novaĵo pri alveno de ĈPLA-anoj por garnizono, ekbolis la insuleto. La insulanoj pensis, ke post alveno de la trupo, estiĝos malfacilo en akvoprovizo. Vespere, ili kunvenis. Sub la propono de onklo Feng, ĉiuj vilaĝanoj faris interkonsenton: cedi puton al la ĈPLA-anoj kaj mem solvi la malfacilon. Onklo Feng kaj lia nepino Hajhong



iniciate zorgis pri akumulo kaj rezervo de fontakvo sur la klifo por vilaĝanoj.

Nun, plotonestro Liu jam konis la sekreton de akvo. Sindetenante de ekscitiĝo, li sin turnis kaj kuris al la taĉmento per unu spiro.

Aŭdinte la rakonton de la plotonestro, ankaŭ la taĉmentanoj ekscitiĝis kaj ekdiskutis. Plotonestro Liu mansvingis por ke aliaj silentu. Poste li diris: “Kamaradoj, Prezidanto Maŭ instruas al ni: **‘Se la armeo kaj la popolo unuiĝas kiel unu persono, kiu en la mondo povas ilin venki?’** La popolamasoj nin amzorgas kaj subtenas, kio estas grava garantio por ni en plenumado de taskoj. Per kio do ni devas danki la vilaĝanojn?”

“Mi proponas, estro Liu, ke ni ĉiutage sendu personon vektoporti akvon por la vilaĝanoj.”

“Jes, bona ideo!” kelkaj konsentis.

“Ĉu tio povas solvi la problemon, se ni nur vektoportos akvon?” refoje demandis Liu.

“Estro!” la silentema kuiristo malgranda Vang tiam ekparolis: “Nia taĉmento defendas kaj konstruas la insuleton ne por unu aŭ du tagoj, tial ni devas elpensi pli taŭgan kaj pli longan aranĝon.”

“Jes!” Liu montris sin aparte ĝoja, “Ni devas helpi la amasojn solvi la malfacilon ne nur por momento sed por ĉiam. . .”

Matenon post ses tagoj, onklo Feng iris al la piedo de la klifo vektoportante sitelojn. Apenaŭ

li metis la sitelojn, li ekmiris: kial la fonto ne elfluas? Ĉe tio iu vokis lin: “Onklo Feng, venu tien ĉi porti!” Li levis sian kapon kaj vidis, ke du ĈPLA-anoj staras sur la montotalio kaj mansvingas al li kun rideto! La onklo haste surgrimpis. Ha, inter herboj kaj floroj aperis puto klara kiel spegulo, sur kies surfaco speguliĝas du figuroj: Plotonestro Liu kaj kuiristo malgranda Vang ridas al li! La onklo nenion povis paroli pro ekscitiĝo, li faris unu paŝon antaŭen kaj forte premis la kalajn manojn de plotonestro Liu kaj diris kun emocio: “Dankon al vi! Vi ja faris bonon por la insulanoj!” Liu diris: “Tio estas nia devo. Ni popolaj armeanoj ja estas servantoj por la popolo!”

“En la lastaj tagoj mi ofte aŭdis tintadon de marteloj, ho estis vi fosantaj puton! Kial vi ne sciigis nin?” Onklo Feng montris sian malkontentecon.

Plotonestro Liu klarigis: “Vi estas okupataj de produktado. Kaj, interalie, ni ja devas preni sur nin tiun ĉi taskon!”

“Onklo Feng, ni armeanoj kaj popolanoj estas samfamilianoj,” sekvis malgranda Vang.

“Ha, ha, ha, bone vi diris!” La onklo ekridis ĝoje. La kristala fonto spegulis iliajn figurojn simbolantajn batalan unuiĝon inter armeanoj kaj popolanoj. . .

La ora suno saltis el la Orienta Maro. Ĝi ĵetis senlimajn lumradiojn tra nubotavoloj kaj forte ruĝigis la insuleton.

de HUANG BILIANG



Ju Huahu kaj

Ĝaŭ Ŝoŭfu—Lertaj

Batalantoj per Minoj

MALRIĈA PARO

En Hajjang-gubernio de la orienta parto de Ŝandong-provinco vivis du eminentaj milicaj herooj Ju Huahu kaj Ĝaŭ Ŝoŭfu.* Iliaj nomoj, same kiel la minoj eksplodigitaj de ili, disaŭdiĝis tra la tuta regiono kaj anekdotoj pri iliaj heroaĵoj cirkulas kiel fabeloj.

La nomitaj herooj estis paro da malriĉuloj. Ĝaŭ Ŝoŭfu loĝis en Ĝaŭtuan-vilaĝo kaj Ju Huahu en Venŝanhoŭ-vilaĝo. Ambaŭ vilaĝoj distancas unu de la alia je malpli ol 1.5 kilometroj kaj kuŝas antaŭ Venŝan-monto. Ju Huahu antaŭe nomiĝis Ju Ginŝeng. Pro lia braveco en batalo kontraŭ la malamikoj oni alinomis lin Ju Huahu (en la ĉina lingvo, Huahu signifas tigriĝon). Kvankam Ju Huahu loĝis en Venŝanhoŭ, tamen li laboris en sia knabeco kiel jardungito ĉe bienulo en Ĝaŭtuan. Ankaŭ Ĝaŭ Ŝoŭfu laboris kiel dungito en la vilaĝo. La sama sorto ligis ilin kiel intimajn amikojn.

En 1937, la japanaj diabloj grandskale invadis Ĉinion. Komplotante kun la agresantoj, la lokaj trupoj de Kuomintango en tiu regiono kruele persekutis la popolanojn. En la vilaĝoj Hingcun kaj Ĝaŭtuan ili konstruis fortikaĵojn. En Ĝaŭtuan la pupaj soldatoj ĉiutage devigis kamparanojn porti akvon, spliti brullignon kaj konstrui fortikaĵon por ili. Se iu ilin iel malkontentigis, ili tuj forte lin batis. Multaj senkulpaj kamparanoj estis senkapigitaj de la malamikoj kaj iliaj kapoj estis pendigitaj sur arboj antaŭ la vilaĝo. Foje, Ĝaŭ Ŝoŭfu splitis brullignon por la malamikoj. Pro iom troa dikeco de la splitoj,

malamikaj soldataĉoj batis lin tiel forte ke li ne povis rektigi sian talion. Ĝaŭ Ŝoŭfu nokte iris al la loĝejo de Ju Huahu. Antaŭ ol li ekparolis, varmaj larmoj jam ruliĝis sur liaj vangoj. Ankaŭ Ju Huahu sate suferis ofendojn kaj humiligojn dum la lastatempa servado ĉe la malamikoj. Ili konsiliĝis por venĝi sin. La sekvantan matenon, portante fekaĵkorbon per mano kaj ŝovelilon sur ŝultro, ili ambaŭ intence preterpasis malamikajn gardstarantojn. Timante kontraŭstaron de la kamparanoj, la malamikoj de tiu vilaĝo malpermesis vilaĝanojn frue ellitiĝi. Vidinte ilin du postenantaj soldatoj alpaŝis. Unu el ili deprenis la korbojn de Ju Huahu kaj Ĝaŭ Ŝoŭfu kaj ŝutis fekaĵojn sur iliajn korpojn. Kolerigite Ju Huahu tuj hakis lian kapon per sia ŝovelilo. Ankaŭ Ĝaŭ Ŝoŭfu donis fortan baton al la alia per la sia. Ambaŭ malamikoj senkrie falis teren. La malamikoj ne konis la veran kaŭzon en tiu okazo kaj supozis, ke tio estas farita de anoj de la Oka-voja Armeo. Post nelonge ili retiriĝis el Ĝaŭtuan al Hingcun.

NASKIĜO DE ŜTONAJ MINOJ

Tiam en la vilaĝon venis kamarado Ju Fengjang. Li unue konatiĝis kun Ju Huahu kaj Ĝaŭ Ŝoŭfu, poste pere de ili li organizis pli ol 80 dungitojn de la vilaĝo kaj mobilizis vilaĝanojn por efektiviĝi reduktion de terrento kaj procento. De tiam stariĝis kontraŭjapana demokratia reĝimo en Ĝaŭtuan kaj Venŝanhoŭ. Poste ankaŭ la amasoj de apudaj vilaĝoj Hianggia, Kuangcun kaj Sungiakuang leviĝis por kune batali kontraŭ la malamikoj, tiel ke la lastaj ne aŭdacis agi senskrupule. La tieaj

*Ĝaŭ Ŝoŭfu instruas
al milicianoj kiel uzi
minon.*



popolanoj nomis tiujn kvin vilaĝojn Kvin Tigroj. Pli kaj pli intensiĝis la “balaado” de la japanaj agresantoj kaj pupaj armeanoj. Ekde 1941 Ju Huahu, Ĝaŭ Ŝoŭfu kaj la popolanoj de la kvin vilaĝoj batalis ĉiutage. Ili portis kun si hojojn, falĉilojn, glavojn, lancojn kaj mem faritajn kanonojn dum kamplaboro. En la komenco, la japanaj diabloj malofte sed la pupaj armeanoj ofte surprizis la vilaĝojn, tamen ili ofte malvenkis rebatite de tiaj glavoj kaj memfaritaj pafiloj. En 1942, la japanaj diabloj mem okupis Hingcun. Kun furioza feroceco ili ĉie faris malbonojn. Tiam senutila estis batalo kontraŭ ili nur laŭ la malnova maniero.

Kiel oni povas kontraŭstari la frenezan atakon de la agresantoj? Ju Huahu ekpensis pri ŝtoneksplodigo fare de ŝtonhakistoj kaj opiniis, ke ankaŭ ŝtoneksplodigo povas mortigi malamikojn. Li do interkonsiliĝis kun Ĝaŭ Ŝoŭfu kaj milicianoj kaj decidis fari provon. Ili petis ŝtonhakiston de la vilaĝo fari truon en muelŝtono, poste enmetis pulvon kaj almetis meĉon laŭ la metodo de ŝtonhakistoj. Kun forta bruo ŝtonpecoj disflugis foren je dekoj da metroj. La novaĵo pri sukceso de la provo baldaŭ disportiĝis ĉien. Oni diris: “Nia loko estas

abunda je ŝtonoj.” Ĉiuj vilaĝoj do ekagis por fari ŝtonajn minojn.

LA UNUA VENKO AKIRITA PER ŜTONAJ MINOJ

En aprilo de 1943, 400-500 japanaj diabloj refoje faris atakon al la vilaĝo. Sub la gvido de Ĝaŭ Ŝoŭfu kaj Ju Huahu milicianoj enterigis 70 ŝtonajn minojn ĉe montpieda vojo. Tiam mankis al ili eksplodigiloj. Milicianoj antaŭtempe sin embuskis apud la ŝtonaj minoj por ekbruligi meĉon. Kiam la malamikoj alproksimiĝis, eksplodis la ŝtonaj minoj. Forte batite, la malamikoj konsterniĝis kaj panike retiriĝis al la fortikaĵo de Hingcun portante vunditojn kaj kadavrojn.

Kvankam la malamikoj retiriĝis, tamen la nombro de la mortigitaj kaj vunditaj malamikoj estis negranda, ĉar la ŝtonaj minoj eksplodis antaŭ ol la malamikoj proksimiĝis al ili pro uzo de maloportuna meĉo. Malgraŭ tio, la ŝtonaj minoj vekis grandan atenton de guberniaj kaj distriktaĵaj gvidantoj, dank’ al kies helpo la milicianoj faris grandan kvanton da eksplodigiloj. Tio multe kuraĝigis la amasojn. Post nelonge, la malamikoj faris novan atakon,

la milicianoj de la kvin vilaĝoj enterigis pli ol 1,000 minojn. Kiam la malamikoj trairis Ĝaŭtuan kaj eniris en la montaran zonon de Venŝanhoŭ, la milicianoj lanĉis batalon. De supre falis kugloj kaj sube eksplodis minoj. 500 japanaj diabloj kuris ĥaose en mina reto kaj ne povis sin liberigi. Pli ol 30 malamikoj mortis aŭ vundiĝis. Fine ili devis retiriĝi al sia fortikaĵo.

De tiam disvolviĝis mina batalo en la tuta Haj-jang-gubernio. En junio la supera instanco alsendis multajn eksplodigilojn kaj funkciigis kurson por lernigi al milicianoj de ĉiuj vilaĝoj taktikon de mina batalo.

“VENU SUPREN, NI NE HAVAS MINOJN.”

Iufoje, malamikoj aliris surprizi Ĝaŭtuan kaj Venŝanhoŭ. Iu oficiro de la pupa armeo arogante diris, ke ili ne timas minojn kaj la milicianoj ne havas minojn. Tiam Ju Huahu estis en Venŝanhoŭ. Informiĝinte pri veno de la malamikoj, li enterigis minojn sur la ĉefaj vojoj. Apenaŭ la malamikoj atingis Jehu-monton, du minoj eksplodis kaj la malamikoj diskuris. Milicianoj manklakis sur la monto kaj kriis ironie: “Venu supren, ni ne havas minojn!” Kolerigite la malamikoj tuj sin ordigis kaj lanĉis atakon al la milicianoj. Apenaŭ ili antaŭenmarŝis dek metrojn, eksplodis tri minoj, kiuj mortigis 7 kaj vundis pli ol 40 malamikojn. La ĵus fanfaroninta malamika oficiro tuj sin turnis por forkuri gvidante sian trupon. Kiam la malamikoj retiriĝis preter la suda fino de Ĝaŭtuan, ilia vojo jam estis barata de Ĝaŭ Ŝoŭfu kaj aliaj. Du eksplodigitaj minoj mortigis kaj vundis 9 malamikojn. En tiu tago, ĉ. 60 malamikoj mortis aŭ vundiĝis.

De tiam la malamikoj fariĝis pli ruzaj. Ĉiufoje, kiam ili faris atakon, ili ekspedis min-serĉan grupon marŝantan fronte. Ili faris blankan cirkon al ĉiu suspektinda loko kun postsigno de fosaĵo. Ĝaŭ Ŝoŭfu kaj Ju Huahu do ĉie faris falsajn suspektindajn postsignojn kaj enterigis multajn minojn sen postsigno. Minoj eksplodis ĉie kiel antaŭe. Kiam la malamikoj forlasis la metodon, la milicianoj starigis pajlajn homfigurojn kaj slogantabulojn ĉe la suspektindaj lokoj por inciti la malamikojn. Kolerigite la malamikoj ektiris ilin, kaj tio kaŭzis eksplodon de minoj. Havante nenian kontraŭrimedon ili nur povis gapi al ili kun kolero.

VARIA TAKTIKO

La malamikoj elpensis novan kontraŭrimedon. Ili elterigis ĉiun trovitan minon kaj portis ĝin al siaj oficiroj por ekzameno. Kion fari? Post cerbu-

mado kaj provado Ju Huahu kaj Ĝaŭ Ŝoŭfu kreis minon kun interna fajrigilo. Foje, la malamikoj elterigis plurajn ŝtonajn minojn. Apenaŭ ili renversis la minojn, ĉi tiuj jam eksplodis. Unu neeksplodigita mino estis portita al la fortikaĵo kaj metita sur tablon en la oficejo. Kiam japanaj oficiroj admiris ĝin, subite ektondris bruon, kaj la diabloj mortis de la eksplodo. Tamen la malamikoj ankorau venis por elterigi minojn. Ĝaŭ Ŝoŭfu kaj Ju Huahu kreis ĉen-minaron. Kiam ili elterigis unu minon, ĝi tuj kaŭzis eksplodon de la alia. Tial la malamikoj ne plu aŭdacis elterigi minojn.

Minoj teruris la malamikojn, tiel ke ili ne aŭdacis tuŝi eĉ herbojn. Ili do uzis minserĉilojn. Kiam ili trovis minon, ili do detruis ĝin per longa stango kun hoko ĉe la ekstremo. Ĉiufoje, kiam malamika minserĉa grupo antaŭe serĉis minojn, malamika trupo certe sin ŝirmis en proksima loko. Se ĝi sukcesis eksplodigi minojn, tiam ĝojegis la malamikoj. Post kelkaj detruoj de la malamikoj Ju Huahu kaj Ĝaŭ Ŝoŭfu trovis la kutimon de la malamikoj en agado. En aprilo de 1944, pli ol 500 malamikoj faris atakon. Ju Huahu, Ĝaŭ Ŝoŭfu kaj ilia mina grupo enterigis falsajn minojn sur la vojoj proksime de Penggeĝuang maldekstre de Ĝaŭtuan kaj 18 verajn minojn en apudaj ŝirmejoj. La minserĉa grupo de la malamikoj trovis minojn sur la vojo kaj atentigis la sekvantan trupon. La lasta tuj devojiĝis al apudaj kampeĝoj. Ekaŭdiĝis surdigaj tondroj. 12 minoj disŝiris pli ol 20 malamikojn.

SAGACA BATALO

Malvenkis la artifiko de malamikoj pri mindetruo. Trovinte nenian rimedon kontraŭ Ju Huahu kaj Ĝaŭ Ŝoŭfu, ili decidis trairi montan vojeton, rivervalon kaj arbaron sen homspuroj anstataŭ grandan vojton por eviti minojn. Tamen, kiel ajn ruzaj estis la malamikoj, mineksplodoj ĉiam konsertnis ilin. Ĉar Ju Huahu kaj Ĝaŭ Ŝoŭfu havis intiman ligiĝon kun la amasoj, ili ĉiam ĝustatempe ricevis informojn pri la malamikoj. Iutage, ili informiĝis, ke pli ol mil malamikoj venos por venĝo kriante ke ili neniigos la kvin tigrajn vilaĝojn per rabado, bruligado kaj masakrado. Ju Huahu kaj Ĝaŭ Ŝoŭfu tuj okazigis urĝan kunvenon por interkonsiliĝo. Ili analizis, tra kiuj vojoj la malamikoj probable venos. Ju Huahu aranĝis minan reton sur Penzi-monto kaj Ĝaŭ Ŝoŭfu enterigis minojn en Dugiaguang. En la sekvanta tago la malamikoj iris ataki Penzi. Tie troviĝis du montpintoj granda kaj malgranda, kiuj interligiĝis nur per mallarĝa kaj malfacile trairebla monteĝo. Ju Huahu enterigis minojn sur la ĉefaj vojoj de tiu monto. Kiam la

malamikoj aperis antaŭ la monto, Ju Huahu pafis ĉielen por allogi malamikojn. Je aŭdo de la pafado la lastaj spiteme sturmis al la granda montpinto kaj intencis iri al la malgranda montpinto. Apenaŭ ili forlasis la grandan montpinton, eksplodis du minoj. Tamen la diabloj daŭre antaŭenmarŝis kaj trairis la monteĝon. Sur deklivo aliaj du minoj eksplodis. La timigitaj malamikoj tuj devojiĝis kaj tio estigis kelkajn grandegajn tondrojn. La mortigitaj kaj vunditaj malamikoj ruliĝis malsupren laŭ la deklivo. Ululado skuis la montojn. La malamikoj ne plu aŭdacis antaŭenmarŝi kaj retiriĝis timeme laŭ siaj spuroj. Por trairi la vojon 6 kilometrojn longan ili uzis 8-9 horojn. En tiu tago pli ol 40 japanaj kaj pupaj soldatoj estis mortigitaj kaj vunditaj.

“SE VI NE VENAS, NI IRAS AL VI!”

Post tiu batalo Ju Huahu kaj Ĝaŭ Ŝoŭfu pensis, ke la malamikoj certe venos por venĝo. Tamen pasis jam pli ol dek tagoj, la malamikoj ankoraŭ ne venis. “Se vi ne venas, do ni iras al vi!” Foje, Ĝaŭ Ŝoŭfu kaj Ju Huahu ŝmiris sin per koto, enrampis nokte en fortikaĵon de la malamiko kaj ŝtele enterigis minon sub skribotablon de la malamiko. En la sekvanta tago, kvin pupaj soldatoj estis mortigitaj de la mino. Alifoje, Ju Huahu enŝteliĝis en Hingcun kiam la malamikoj revenis al ĝi post “balaado”. Li enterigis kvar minojn ĉe pordo de loĝejo de la malamikoj. Kiam nombro da malamikoj revenis al sia loĝejo post vespermanĝo, la kvar minoj samtempe eksplodis. La mortigitaj kaj vunditaj malamikoj estis transportitaj per du kamionoj al Kindaŭ. Poste la milicanoj de la proksimaj vilaĝoj sieĝis Hingcun, enterigis ĉie ŝtonajn kaj ferajn minojn en la ĉirkaŭaĵo, tiel ke la malamikoj ne povis iri pli ol 2 kilometrojn for de Hingcun. En aŭgusto de 1944, la malamikoj malgraŭvole forlasis Hingcun kaj fuĝis al Hajjang.

**Ju Huahu kaj Ĝaŭ Ŝoŭfu faris grandajn kontribuojn al la popolo en pli ol dek jaroj de la Kontraŭ-japana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito. Ili kreis ĉirkaŭ 30 specojn de minoj kaj partoprenis pli ol 200 grandajn batalojn kaj pli ol 200 malgrandajn. Laŭ statistiko de Ju Huahu, li mortigis kaj vundis ĉ. 170 malamikojn. Pro tio li estis honore nomita kiel eksplodiga majstro kaj trifoje elektita kiel eksplodiga heroo. Ĝaŭ Ŝoŭfu mortigis kaj vundis 138 malamikojn, detruis 2 malamikajn kamionojn kaj pro tio estis trifoje elektita kiel milica batalheroo de la orienta parto de Sandong.*



RAPIDA DISVOLVIĜO KAJ GRANDA ROLO DE CEMENTAJ FABRIKETOJ EN JUNNAN-PROVINCO

Vigle disvolviĝas la malgrandaj cementaj fabrikoj de Junnan-provinco. En 1971, la cementaj fabrikoj pliiĝis je pli ol unuoblo kompare kun tiu de 1970, kaj la produktokvanto de cemento pliiĝis je pli ol 26.6% kompare kun tiu de 1970.

Nun, 13 regionoj, aŭtonomaj subprovincoj kaj pli ol triono de la gubernioj jam havas mem konstruitajn cementajn fabrikojn, kaj multaj guberniaj cementaj fabrikoj estas en konstruado. La produktokvanto de tiuj fabrikoj jam okupas pli ol kvaronon de la totala produktokvanto de cemento de la tuta provinco. La cemento de tiuj fabrikoj ne nur subtenis konstruadojn de akvorezervejoj, kanaloj, kulvertoj, hidroelektraj stacietoj, irigaciaj kaj drenaj pumpstacioj, kaj ankaŭ la konstruadon de lokaj industrioj, ŝoseoj kaj pontoj.

INSEKTA LAKO

La produktado de insekta lako (angle: lac) gajnis novan disvolviĝon en Lingling-regiono de Hunan-provinco. En 1971, la areo de arbaroj sur kiuj parazitis lakoinsektoj atingis pli ol 9,000 muojn en la regiono. En la tuta regiono la produktokvanto de kruda insekta lako pliiĝis 1.5oble kompare kun tiu de 1970. En la kuranta jaro, la areo de arbaroj por la parazitaj insektoj jam plivastiĝis ĝis pli ol 30,000 muojn.

Insekta lako estas grava materialo por industrioj de naciddefendo, kemio, presintinkuro, medikamentfabrikado kaj manĝaĵo. Lingling estas montregiono en kiu troviĝas multaj specoj de sovaĝaj arboj taŭgaj por parazitado de lakoinsektoj. Ekde 1965, oni enkondukis lakoinsektojn de aliaj lokoj. Nun, en la tuta regiono 102 brigadoj de 33 komunumoj de 5 gubernioj komencis produkti insektan lakon.

La Ekspozicio de Belartaj Verkoj

Prezidanto Maŭ Ligiĝas kun Ni Koro kun Koro (Oleopentraĵo)






Rekruto de Karbominejo (Ĉinstila pentraĵo)

EN la kuranta somero, okazis en Pekino la Ekspozicio de la Tutlandaj Belartaj Verkoj en la Ĉina Belarta Halo. Sume estis elmontrataj pli ol 270 belartaj verkoj (pli ol 300 bildoj) en formoj de ĉinstila pentraĵo, oleopentraĵo, gravuraĵo, rakonta bildserio, novjara pentraĵo, propaganda pentraĵo, guaŝo kaj papertrancaĵo. Tiuj ekspoziciataĵoj estis elektitaj el granda kvanto da verkoj kreitaj de diverslokaj amasoj de la tuta lando. Inter ili estis novaj verkoj de malnovaj pentristoj, ekzemple, la ĉinstilaj pentraĵoj *Nova Ole-urbo en Suda Ĉinio*, *Bela Kamparo de Suda Ĉinio* kaj ankaŭ verkoj de junaj belartaj laborantoj kiel ekzemple la oleopentraĵo *Batalo por Bronzo* kaj la ĉinstilaj pentraĵoj *En Karbominejo Disfloras la Daking-a Spirito* kaj *Antaŭ Eniro de Universitato*. En la ekspozicio, la verkoj de belartaj amatoroj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj okupis 65%.

Sekvante la revolucion literaturan kaj artan linion de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, la vasta belarta laborantaro de nia lando kun plena politika entuziasmo kaj per simpla peniko prezentis la amon de diversaj nacioj de nia lando al la Partio kaj Prezidanto Maŭ, bildigis grandiozan scenon de la socialisma revolucio kaj

Ĝoja Rikoltado de Kotono (Novjara bildo)



socialisma konstruado de nia lando, kreis proletarajn heroajn figurojn batalantajn sur diversaj frontoj kaj spegulis la revolucion amikecon kaj batalan unuiĝon inter la popoloj de nia lando kaj la tuta mondo.

La ĉinstilaj pentraĵoj *Rekruto de Karbominejo* kaj *Neforgeseblaj Tagoj* estas verkitaj de Jang Ĝiguang. La pentraĵo *Rekruto de Karbominejo* estas kreita dum lia profunda vivospertado en Ma-an-karbominejo en Ĝaŭking-gubernio de Guangdong-provinco. En la karbominejo, Jang Ĝiguang ofte laboris kune kun karboministoj, interkompreniĝis ili iom post iom kaj pli kaj pli profundiĝis lia amo al ili. Plejparto de la karboministinoj estas elektitaj el la ĉirkaŭaj vilaĝoj kaj ilia laboremo profunde kortuŝis Jang Ĝiguang kaj lin kaptis forta deziro pentri ilin, sed kian bildon li devas fari, li ne sciis. Poste li multfoje rimarkis, ke junaj karboministinoj ĉiam montras eksterordinaran ĝojon je sinvestado antaŭ iro al laboro kvazaŭ dirante: “La laborvestoj estas la plej belaj.” Tiam imaga bildo kun nova vivospiro prezentiĝis antaŭ liaj okuloj. La pentraĵo reliefigis figuron de juna karboministino, kiu estas viglanima kaj plena de fido kaj espero al la nova vivo. Per glataj tuŝoj kaj klaraj linioj la pentristo prezentis la ardan kaj firman volon de la karboministinoj partopreni la socialisman konstruadon de la patrolando.

La oleopentraĵo *Prezidanto Maŭ Ligiĝas kun Ni Koro kun Koro* estas kolektive verkita de la Belarta Grupo de Ŝenhi-provinco. Tiu pentraĵo rememorigas al ni la kortuŝajn scenojn de la tagoj, kiam Prezidanto Maŭ persone gvidis la produktan kampanjon en norda Ŝenhi-provinco dum la plej malfacilaj jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Tiam la milita ĉirkaŭsieĝo kaj la ekonomia blokado fare de la japana imperiismo kaj kuomintangaj reakciuloj alportis al la liberigita regiono ekstreme seriozan malfacilon. Post kiam Prezidanto Maŭ alvokis “**eklaboru mem por akiri sufiĉe da vestoj kaj manĝaĵoj**”, la armeo kaj la popoloj de la liberigita regiono organiziĝis por ekspluati virgan teron kaj produkti grenon per siaj du manoj. Post pena kaj malfacila batalado de kelkaj jaroj, ili fine transformis la virgan leŭsan altebenejon en grenproduktan regionon, kaj tiel estis frakasita la blokado fare de la kuomintangaj reakciuloj. La pentraĵo vivece bildigis la emocian scenon ke Prezidanto Maŭ ligiĝis kun popolamasoj koro kun koro. Kun ĝojo pro riĉa rikolto oni elektis siajn reprezentantojn, inter kiuj sin trovis maljunaj malriĉkampanoj, soldato, junulo kaj virino, kaj sendis ilin al Prezidanto Maŭ por gastigi ĉe li, kunportante bambuan korbon kaj pezajn spikojn de maizo kaj milio. Prezidanto Maŭ kore interparolis kun ili kaj ĉiu vorto de li trafis ilian koron. La pentraĵo montris la subjektan penson per detaloj: Per spikoj de maizo kaj milio



*Armeanoj kaj Popolanoj
Estas Samfamilianoj
(Ligna gravuraĵo)*



Antaŭa Eniro de Universitato (Ĉinstila pentraĵo)

ĝi montras, ke oni gajnis riĉan rikolton; la simplaj mebloj en la kavernĉambro, la olelampo kaj penikujo sur la tablo montras, ke Prezidanto Maŭ diligente laboris tage kaj nokte por la liberiga afero de la ĉina popolo. Ankaŭ priskribo de la medio ludas gravan rolon. La brulantaj lignokarboj kaj la taso kun varma teo en la mano de la junulo aldonis varmon al la kavernĉambro. La brilaj sunradioj enpenetras tra la fenestro, kio simbolas la lumon kaj feliĉan vivon en la revolucia bazloko.

Krom la vasteco de enhavo kaj la varieco de formo kaj stilo, la elstara karakterizo de la ekspozicio estas tio, ke la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj fariĝis mastro de belarto per ilia aktiva verkado. La gravuraĵoj *Maŝinoj Senĉese Fluas el la Fabriko*, *Armeanoj kaj Popolanoj Estas Samfamilianoj* kaj la novjara pentraĵo

Ĝoja Rikoltado de Koton kaj multaj aliaj verkoj estas faritaj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Tiuj pentristoj estas kaj lertuloj en laboro kaj aktivuloj en arta aktivado. En ordinaraĵoj ili pentris sur nigraj tabuloj kaj murgazetoj de laborejoj aŭ produktaj grupoj por propagandi bonajn kondutojn de zorgo pri kaj sinofero por la kolektivo kaj malkaŝi kaj kritiki la burĝaron. Iliaj verkoj kuraĝigas kaj edukas la amasojn.

La novjara bildo *Ĝoja Rikoltado de Koton* estas verkita de Li Fenglan, kamparanino en Huhian-gubernio de Ŝenhi-provinco. Ŝi estas patrino de kvar infanoj. Kvankam ŝiaj dommastrumaj laboroj estas pezaj, tamen ŝi faris pli ol 600 pentraĵojn en libertempo de 1958 ĝis nun. En la aŭtuno de 1971, Guangming-komunumo, kie ŝi loĝas, gajnis alian riĉan rikolton de koton. Dum la rikoltado, la virinoj de la produkta grupo ĝoje kolektis kotonon de frumateno ĝis vespero. Aliaj komunumanoj transportas kotonon per ĉaroj por vendi ĝin al la ŝtato. Tiam en la kotonkampoj kaj sur la ŝoseo ĉie aŭdiĝis ridoj kaj kantoj. Vidinte tion, Li Fenglan tre emociiĝis kaj volis ĝin pentri. Sed ŝi ne sukcesis

en la unuafoja provo kaj pentris nur kotonkolektantajn virinojn en kotonkampoj. Rigardante la pentraĵon komunumanoj diris: "Ĉiujare ni gajnis riĉan rikolton de koton, sed la pentraĵo ne spegulis la malsamon en ĉijara riĉa rikolto." La kritikoj de la amasoj donis al ŝi inspiron. Ŝi foje foje konsiliĝis kun la amasoj kaj rearanĝis sian verkon.

La pentraĵo *Ĝoja Rikoltado de Koton* emfaze bildigis la emocion scenon, ke sur la ŝoseo antaŭ la kotonkampoj kun kotonkolektantaj virinoj, sen nombraj ĉaroj grandaj kaj malgrandaj de produktaj grupoj sinsekve kuradas al la ŝtata aĉetstacio por vendi ĵus kolektitan kotonon. Ĝi vivece spegulas la novan spiriton kaj novan fizionomion de la komunumanoj en la kampanjo de lerno de Daĝaj en agrikulturo kaj ricevis laŭdojn de la amasoj.

Belartaj Verkoj

Senĉesa Progreso (oleopentraĵo)


de Liu Ĝiguang, Guan Cujkuj kaj Vang Bo





Herbejo (laka pentraĵo)
de la Grupo de Lakaj Pentraĵoj de Siĉuan

Alia Riĉa Rikolto (guaŝo)
de Gu Pan kaj Pan Honghaj



Granda Muro de Amikeco

Foto de Li Gongliang



Konstruado de Irigacia Kanalo
sur Rokmuro (Ĉinstila pentraĵo)

de Ĉen Ĝongji



Novaj Tibetaj Kuracistoj

de Ĝu Najĝeng



Patrolo en Fiŝhaveno (lignogravuraĵo)

de la kantona trupo de ĈPLA

La Grundo-malleviĝo de Ŝanhajo Estas Fundamente Regata

ŜANHAJO apud la Orienta Ĉina Maro estas la plej granda industria urbo de Ĉinio. Ekde 1921, ĝia grundo malleviĝis ĉiujare, ĝis 1965 la loko en alarma situacio malleviĝis je 2.37 metroj. Dum la 6 jaroj de la Granda Proletara Kultura Revolucio de 1966 ĝis 1971, la laboristaro kaj revolucia popolo de Ŝanhajo gvidataj de la Partio fundamente regis la grundo-malleviĝon de tiu urbo. En tiu periodo la grundo de Ŝanhajo ne nur ĉesis malleviĝi, sed eĉ leviĝis je 16 milimetroj.

LA "ENIGMO" DE LA GRUNDO-MALLEVIĜO DE ŜANHAJO

Post la Liberiĝo, la Partio kaj ŝtato faris multajn aranĝojn por laŭeble redukti la malbonan influon kaŭzitan de la grundo-malleviĝo al la produktado kaj la popola vivo de Ŝanhajo. Kvankam la ŝtato konstruis laŭlonge de riveroj kontraŭtajdan digon

longan je 100 kilometroj, starigis multajn pump-staciojn por rapide dreni akvon dum pluvego aŭ atako de tajdo. Tamen la tera etaĝo de staplejoj en iuj malaltaj lokoj estis ne plu uzeblaj kaj ŝipoj ne povis traveturi iujn pontojn dum alta tajdo pro malleviĝo de iliaj pilieroj. La tera surfaco de Ŝanhajo altas je malpli ol 4 metroj super la mara nivelo. Se oni ne rapide regus ĝian grundo-malleviĝon, do certe alvenus la tempo, kiam Ŝanhajo sin trovus sub la mara nivelo.

Tiu malfavora situacio nepre devis esti ŝanĝita. Por regi la malleviĝon de grundo, oni unue devis trovi la veran kaŭzon. En iu kunveno de 1962, iuj diris, ke la malleviĝon de Ŝanhajo kaŭzis "dek faktoroj", nome: leviĝo de la mara nivelo, pezpremo de altaj domoj, ekspluato de gaso, nova formacia movado de la terkrusto kaj aliaj.

Kio el tiuj faktoroj estas prava? Ĉu oni povas direkti nian praktikon per ĝi? Ni venis al iu tajd-

*Gang Ĉeng (meze),
sekretario de la partia
komitato de la
Ŝanhaja Hidro-geologia
Taĉmento, faras novan projek-
ton por regi la grun-
do-malleviĝon kune
kun vicĉefinĝeniero
Li Baŭhing (la dua
de maldekstre) kaj
aliaj teknikistoj.*





Ili faras mezuradon de la akva nivelo por esplori la grundo-leviĝon post enpumpado de akvo en tertavolojn en vitro.

observa stacio, rigardis la registrojn de la pasintaj jaroj kaj trovis, ke la tajdo plialtiĝis jaron post jaro; ni venis al alia stacio por enketo kaj trovis, ke tie la tajdo estis alta en iuj jaroj kaj malalta en la aliaj, en 48 jaroj de 1915 ĝis 1963 la diferenco de tajda alteco neniam superis 30 milimetrojn, la registroj montris fundamentan stabilecon. Kial estas du malsamaj registroj? Ni mezuris la nivelajn punktojn de ambaŭ stacioj kaj trovis ke tiu de la unua estas en malleviĝanta loko kaj malleviĝas kune kun la grundo. La ciferoj de malleviĝo de la nivela punkto ĝuste estas tiuj de tajda leviĝo registritaj en la materialo. La nivela punkto de la dua ne estas en malleviĝanta loko, tial ĝiaj ciferoj estas fundamente stabilaj. La enketo neigis la malpravan atributon, ke la leviĝo de la mara nivelo kaŭzis la grundo-malleviĝon de Ŝanhajo.

Ĉu la malleviĝo estas kaŭzita de la pezpremo de altaj domoj? Ni kontrolis la historiajn materialojn de kelkaj domegoj de Ŝanhajo kaj konstatis, ke la domegoj ja malleviĝis en la unuaj jaroj post ilia finkonstruo, sed la procento de malleviĝo mal-

grandiĝis jaron post jaro kaj la malleviĝo fundamente ĉesis post 15-20 jaroj. Tio montris, ke la domegoj influas la grundo-malleviĝon nur parte kaj provizore, do ili ne povas esti la ĉefa kaŭzo de la grandarea grundo-malleviĝo de Ŝanhajo.

Ĉu la ekspluato de gaso estas la kaŭzo? Efektive, oni delonge ĉesigis ekspluaton en la urbo kaj ekspluatitas malmulte da gaso nur en ĝia ĉirkaŭaĵo.

En kio kuŝas la ĉefa kaŭzo de la grundo-malleviĝo de Ŝanhajo? Ni faris vastan prospektoradon nin apogante sur la vastaj laboristaj amasoj kaj detale analizis grandan kvanton da historia kaj nuna materialoj. Ni rimarkis, ke la industriaj kvartaloj en la orienta kaj okcidenta partoj de la urbo malleviĝis plej serioze. Kaj en tiuj industriaj kvartaloj la loko kun kompare multaj ŝpinteksejoj malleviĝis plej serioze. Multaj profundaj putoj kaj multa konsumado de subtera akvo karakterizas la ŝpinteksejojn. Laŭ tiu trovo ni enketis pri la profundaj putoj

de la urbo, iliajn historion kaj nunan staton en konsumado de subtera akvo, kaj starigis "arkivon" por ĉiu puto. La unua profunda puto de Ŝanhajo estis fosita en 1860, ĝis la Liberiĝo 708 profundaj putoj estis fositaj kaj la konsumata kvanto de subtera akvo en ĉiu tago estis 240,000 tunoj. En 1948 la grundo de Ŝanhajo malleviĝis je 35 milimetroj. Dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano post la Liberiĝo, la nombro de profundaj putoj pliiĝis ĝis 854 kaj la kvanto de la ĉiutage elpumpita akvo atingis 340,000 tunojn, la ĉiujara malleviĝo atingis 54 mm. Dum la periodo de la granda impeto, la nombro de profundaj putoj multiĝis ĝis 1,183 kaj la kvanto de la ĉiutage elpumpita akvo estis 560,000 tunoj, kaj la jara malleviĝo atingis 98 mm. La menciitaj ciferoj klare montris la rilaton inter la nombro de profundaj putoj, kvanto de konsumita akvo kaj grundo-malleviĝo: Ju pli multaj profundaj putoj estas fositaj kaj pli granda kvanto da akvo estis konsumita, des pli rapide la grundo malleviĝis. La ĉefa kaŭzo de la grundo-malleviĝo de Ŝanhajo estis trovita.

LA LEĜO DE MOVADO INTERNE DE LA STRATUMOJ

Por solvi la problemojn de konado kaj praktiko pri la grundo-malleviĝo, estis necese kapti la leĝon de movado interne de la stratumoj. Ni faris vastan prospektoradon kaj esploradon pri la strukturo de la stratumoj de Ŝanhajo kaj enterigis dekojn da mezuriloj kaj dekojn da esploraj instrumentoj en diversaj tertavoloj de multaj lokoj de la urbo kaj gajnis grandan kvanton da teknikaj donitaĵoj kaj materialo per perioda observado al la subtilaj ŝanĝiĝoj de la nivelo de subtera akvo, kunpremiĝo de stratumo kaj aliaj dum la elpumpado de subtera akvo. **“Foriginte la senvaloraĵn kaj preninte la esencajn, foriginte la falsaĵn kaj konservante la veraĵn, procedante de ĉi tiu al tiu kaj de la supraĵo al la interno”**, ni venis al kono pri la esenco. La nevidebla kaj nepalpebla “sekreto” en la stratumoj fine estis malkaŝita.

Sub Ŝanhajo kuŝas 300 metrojn dika tertavolo sur la roka tavolo, kaj ĝi estas dividebla. 150 metrojn subtere ĝis la roka tavolo sin trovas argila tavolo, kiu povas rezisti fortan premon kaj estas nefacile kunpremebla; sur la argila tavolo estas du sablotavoloj entenantaj akvon kaj 4 tertavoloj, inter la lastaj nur unu povas rezisti fortan premon kaj la tri aliaj estas facile kunpremeblaj tavoloj de glueca ŝlimo. Kial multa elpumpado de subtera akvo kaŭzis grundo-malleviĝon en Ŝanhajo kaj ne en aliaj lokoj? Kial la putotubo de iuj profundaj putoj mem leviĝas kaj tiu de aliaj ne? Ĉar la tertavolo de glueca ŝlimo de la tera surfaco ĝis 75 metrojn sube ne povas efike rezisti fortan premon, kaj kiam subtera akvo estis elpumpita, la akva nivelo malleviĝis, la tertavolo kunpremiĝis perdinte grandan kvanton da akvo. Responde al tiu ŝanĝiĝo aperas al la tersurfaco grundo-malleviĝo. Antaŭe dum prospektorado en aliaj lokoj, ni elpumpis akvon el roka tavolo, tial ne okazis grundo-malleviĝo. Kiam profundaj putoj koncentriĝas en iu loko kaj la grundo malleviĝis perdinte grandan kvanton da akvo, la putotuboj de tiuj putoj kiuj eniĝis en la nemalleviĝantan sablotavolon entenantan akvon je 75 metroj subtere, tamen ne malleviĝis. Tio estigis la fenomenon ke la putotuboj “leviĝis”.

Multflanka analizo de la materialoj akiritaj en enketo kaj praktiko kondukis nin al jena kono: La grundo-malleviĝo de Ŝanhajo estas kaŭzita de grandkvanta elpumpado de subtera akvo koncentre el la du sablotavoloj inter 75 kaj 150 metroj subtere, en kelkaj industriaj kvartaloj de la orienta kaj okcidenta partoj de la urbo kaj en la tempo de so-

mero. Tion spegulas la fenomenoj, ke la industriaj kvartaloj malleviĝis pli multe ol la aliaj kaj la malleviĝo estas pli multa en somero ol en vintro.

LA MOVADA LEĜO DE SUBTERA AKVO DUM ENPUMPADO DE AKVO EN LA TERON

Post kiam ni konis la ĉefan kaŭzon de la grundo-malleviĝo, ni komencis serĉi metodon por regi la malleviĝon. Iuj proponis: Se la elpumpado de subtera akvo kaŭzas la grundo-malleviĝon, do oni devas ne tion fari se oni volas ĉesigi la malleviĝon. Ĉu prava estas tia opinio? Enketo pri la uzado de subtera akvo montris, ke ĉ. 30% de ĝi estas anstataŭeblaj per surtera akvo, sed 70% ne. Ĉar, en somero, la temperaturo de subtera akvo estas multe malpli alta ol tiu de surtera akvo, multaj fabrikoj bezonas ĝin por malaltigi la temperaturon, reguligi la humidecon de laborejoj kaj plibonigi la laboran kondiĉon de laboristoj. Pro tio, la uzado de subtera akvo ne nur devas esti permesata, sed ankoraŭ plimultigota kun la disvolviĝo de la industria produktado. Do la sola vojo estas deteni la grundo-malleviĝon dum la uzado de subtera akvo. Ni decidis fari eksperimentadon por deteni la grundo-malleviĝon per enpumpado de surtera akvo en la teron por altigi la nivelon de subtera akvo.

Tamen, kiam ni komencis agi, ni trovis la aferon ne tiel simpla kaj antaŭ ni kuŝis multaj novaj problemoj, urĝe konendaj kaj solvendaj.

Analizo de korodado de roka tavolo.



Kie oni devas enpumpi akvon? Nia antaŭa prospektorado montris, ke la subtera akvo de Ŝanhajo estas provizata de Jangzi-rivero tra antikvaj subteraj riveroj. La subteraj tavoloj entenantaj akvon de Ŝanhajo estas ebenaj kaj konsistas el subtila sablo, en ĝi akvo moviĝas malrapide, tial la grundo malleviĝas post grandkvanta elĉerpado de la subtera akvo. Iuj proponis, ke oni boru ĉirkaŭ la urbo kelkajn putojn por enpumpi akvon, por ke la subteraj akvotavoloj ricevu proksiman provizadon. Sed kiom da akvo oni devas enpumpi por deteni la grundo-malleviĝon de Ŝanhajo? Tio postulas serion da donitaĵoj hidrologiaj kaj geologiaj, sed por akiri tiujn donitaĵojn diversaj kondiĉoj estas bezonataj, unu el ili estas konservi stabilan akvonivelon en 72 horoj. Sed, la subteraj stratumoj de Ŝanhajo ne estas laboratorio; la senĉesa elpumpado per tiom multaj profundaj putoj kaj ankaŭ la leviĝo kaj malleviĝo de tajdo influas la nivelon de subtera akvo. Kie do oni povas trovi absolute "stabilan" nivelon de akvo en la ĉiam moviĝanta naturo? Unu el niaj prospektoraj grupoj klopodis du semajnojn laŭ la dirita plano kaj akiris neniun ĝustan donitaĵon.

La enpumpado de akvo en foraj lokoj malsukcesis. Ĉu oni povas enpumpi akvon per la profundaj putoj en la urbo sin apogante sur la vastaj amasoj? Kun tiu demando ni petis konsilojn de laboristoj kaj ricevis ilian energian subtenon. Komence, ni enpumpis akvon en puton per fajroes-

Membroj de la Hidro-geologia Taĉmento kaj la Akvo-proviza Centro kune mezuras kvaliton de subtera akvo.



tingaj tuboj, sed post nelonge akvo jam ne povis enflui. En la sekvinta tago enpumpita akvo elfluis el la puto kaj svarmiĝis ŝaŭmo sur la aperturo. Ni eligis enpumpitan akvon, ĝin analizis kaj trovis ne nur ŝaŭmon sed ankaŭ multan kombinaĵon de oksigeno kaj fero, kiuj obstrukcis penetriĝon de akvo en tertavolon. Por solvi la problemon de obstrukco, oni devas preventi eniron de aero en la putotubon. La laboristoj elpensis multajn rimedojn por hermetiki ĉiujn enpenetrajn vojojn de aero kaj kreis manipulan metodon de vakua enpumpado kaj perioda elpumpado.

Dum la enpumpado ni zorge faris eksperimenton kaj konstatis, ke la flua rapideco de subtera akvo de Ŝanhajo havas malgrandan diferencon en malsamaj lokoj, ĝenerale ĝi estas tre malgranda, eĉ dum elpumpado la akvo en sablo fluas nur 3-5 metrojn en diurno. La temperaturo de subtera akvo apenaŭ ŝanĝiĝis en 1-2 monatoj kaj tre malmulte eĉ en duona jaro.

La kono pri tiuj leĝoj havigis al nia enpumpado objektivan bazon. Pro la malrapida fluado, la subtera akvo povas esti konservata en longa tempo, kio ebligas al la nivelo de la subtera akvo resti sur certa alteco en ĉiu jaro kaj deteni grundo-malleviĝon. En vintro, kiam multaj fabrikoj ĉesigis uzadon de subtera akvo, ni grandkvante enpumpis kaj malmulte elpumpis akvon, la subtera akvo leviĝis iom post iom kaj ankaŭ la tera surfaco komencis leviĝi; en somero de la sekvinta jaro, kiam la fabrikoj grandkvante elpumpis akvon kaj enpumpis malmulte, la nivelo de la subtera akvo malleviĝis iom post iom kaj ankaŭ la tera surfaco komencis malleviĝi. La grundo ĉiam estas en leviĝo kaj malleviĝo. Kiam la kvanto de leviĝo de iu jaro egalas al tiu de malleviĝo, ni diras ke la grundo-malleviĝo de tiu jaro estas regata; se la kvanto de leviĝo superis tiun de malleviĝo, tio signifas grundoleviĝon. Ĉar la temperaturo de subtera akvo ŝanĝiĝas malrapide, la plejparto de la fabrikoj vintre enpumpas kaj somere elpumpas akvon, kaj la elĉerpita akvo ankoraŭ estas malvarma; malmultaj fabrikoj somere enpumpas kaj vintre elpumpas akvon, kaj la elĉerpita akvo ankoraŭ estas varma. Ambaŭ kazoj havas altan ekonomian valoron.


LA LIBERO POR REGI LA GRUNDO-MALLEVIĜON GAJNITA DUM ENPUMPADO

Unuapaŝe realiĝis la idealo, ke la grundo ne malleviĝu dum uzado de subtera akvo. Ĉu ni povis aserti, ke ni jam gajnis plenan liberon por regi la grundo-malleviĝon? Ne. Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“La historio de la homaro estas historio de kontinua disvolviĝado de la regno de neceso al la regno de libero. Tiu ĉi procezo neniam finiĝos.”** En la lastaj jaroj, surbaze de senĉesa resumado de sperto, ni decidis gajni pli multan iniciativon kaj liberon por regi la grundo-malleviĝon.

Dum analizado al diversaj registroj de enpumpado kaj la leviĝo kaj malleviĝo de grundo en la pasintaj jaroj, ni trovis ke se la fabrikoj ĉiuj komencis enpumpi akvon samtempe, la nivelo de subtera akvo grandaree leviĝis kaj ankaŭ la grundo leviĝis evidente; se ilia enpumpado komenciĝis en malsama tempo, la nivelo de subtera akvo estis parte alta kaj parte malalta, kaj la grundo leviĝis malmulte. Kaj la sama fenomeno aperis en finiĝo de enpumpado. Se ĉiuj fabrikoj samtempe ĉesigis enpumpadon, la grundo komencis malleviĝi; se ili ĉesigis enpumpadon en malsama tempo, la grundo malleviĝis malmulte aŭ ne malleviĝis.

Koninte tiun leĝon, ni povas pli konscie kaj pli libere regi la grundo-malleviĝon. Antaŭ vintra enpumpado de ĉiu jaro, la koncernaj fabrikoj kune decidis la daton, en kiu centoj da putoj ekenpumpu samtempe. Kaj antaŭ ĉesigo de la vintra enpumpado, ili kune decidis, kiuj ĉesigu la enpumpadon antaŭe kaj kiuj poste en kelkaj grupoj. Poste, laŭ la malsamaj tertavoloj de respektivaj lokoj kaj la postuloj de la malsamaj fabrikoj pri la uzata akvo, ni formis kompletan metodon de enpumpado kiel sistemon observendan de la koncernaj fabrikoj de la tuta urbo. Dank' al tio, en 1966 finiĝis la historio de iom-post-ioma grundo-malleviĝo de 44 jaroj kaj en la 6 jaroj ekde tiam ĝis 1971 la grundo eĉ leviĝis je 16 mm.


Krome, ni plibonigis la kvaliton de la subtera akvo por ke ĝia efiko multobliĝu. Ju pli malvarma estas la subtera akvo, des pli bone ĝi efikas por redukti la temperaturon kaj ĝia kvalito des pli bona. Por akiri malvarman akvon en somero, oni devas enpumpi malvarman akvon en vintro. Tial, ni koncentras enpumpadon en vintro. Ju pli frosta estas la vetero, des pli vigle laboras laboristoj ĉe la putoj. Ili senĉese plibonigas la enpumpadon teknikon por altigi la laborefikon. Dank' al tiuj teknikaj aranĝoj, la temperaturo de la subtera akvo fariĝas ĉiam pli malalta, kio por la koncernaj fabrikoj sig-



La Ŝtata Sepa Kotona Ŝpinteksejo de Ŝanhajo uzas subteran akvon enpumpitan en vintro por reguligi temperaturon kaj humidecon de la laborejoj.

nifas, ke la akva kvalito ĉiam pli boniĝas. Laŭ la registroj de la Ŝtata 17-a Kotona Ŝpinteksejo de Ŝanhajo, la temperaturo de la natura subtera akvo estis 21° C super la nulo, sed tiu de la nuna 14.5° C. Tio signifas, ke la efiko de unu tuno da akvo nun egalas al tiu de 2-3 tunoj da akvo de la pasinteco. De 1966, la industria produktado de Ŝanhajo multe disvolviĝis, ankaŭ la sfero de uzado de subtera akvo grandiĝis senĉese, sed la kvanto de efektive uzita akvo en 1971 reduktiĝis je 7% kompare kun tiu en 1966.

Kvankam ni gajnis tiujn sukcesojn, ili tamen estas nur la unuapaŝaj. Ni serioze studos la filozofian penson de Prezidanto Maŭ, surbaze de la akiritaj atingoj ni senĉese klopodos por ekspluati novajn akvofontojn en pli profundaj tertavoloj, senlace klopodos por koni kaj solvi novajn kontraŭdirojn kaj problemojn en la praktikado, por ke la tero de Ŝanhajo apud la Orienta Ĉina Maro pli bone kaj pli multe servu al la socialisma afero.



Bredi Fiŝojn en Malpura Akvo

HIHUCUN-BRIGADO de la okcidenta antaŭurbo de Tiangin havas 7 relative grandajn fiŝbredajn lagetojn kun areo de ĉirkaŭ 18 hektaroj. Antaŭ 1964, la komunumanoj ĉiujare devis meti en la lagetojn pli ol 250,000 kilogramojn da natura sterko kaj krome iri aliloken elakvigi akvoherbojn por nutri fiŝojn en ilia rapidkreska sezono, nome

junio, julio, aŭgusto kaj septembro. Tiamaniere estiĝis kontraŭdiro, ke la fiŝbredado deprenis de la agrikulturo sterkon kaj laborfortojn.

Ĉirkaŭ Hihucun troviĝas multaj fabrikoj kaj dense viciĝantaj loĝdomoj, kiuj ĉiutage ellasas grandan kvanton da malpura akvo. Helpate de koncerna unuo la brigado kondukis malpuran akvon en rizkampojn tra subteraj tuboj kaj akiris altan produkton de greno post eksperimento. Kiam oni diskutis pri solvo de la nomita kontraŭdiro, iu komunumano diris: "Malpura akvo povas havigi al ni altan produkton de rizo, ĉu ĝi povas esti utiligata por bredi fiŝojn?" Tamen alia kontraŭdiris: "Fiŝo estas viva estaĵo kaj malpura akvo ĝin eble sufokos."

Riĉa rikolto de fiŝoj breditaj en malpura akvo



KIEL BREDI FIŜOJN EN MALPURA AKVO?

Ĉu oni povas bredi fiŝojn en malpura akvo? Pri tio ili diskutis kelkajn vesperojn.

Prezidanto Maŭ instruas: "Ĉiuj konkludoj naskiĝas post enketado, kaj ne antaŭ ĝi."

Por koni, ĉu elementoj de la malpura akvo konvenas al vivado de fiŝoj, la komunumanoj faris seriozan enketon pri la malpura akvo ellasita de ĉirkaŭaj pli ol 50 fabrikoj kaj loĝkvartaloj sub helpo de koncerna unuo. La enketo montris, ke la malpura akvo ellasita de fabrikoj, inkluzive tiujn de led,

prestinkturo kaj kemio, okupis 40% de la tuta malpura akvo kaj tiu de loĝkvartaloj okupis 60%. Post kemia analizo ili trovis, ke la malpura akvo entenas nitrogenon, fosforon kaj kalion utilajn al vivado de fiŝoj, sed ankaŭ arsenon, fenolon kaj cianon malutilajn al fiŝoj, kaj krome jonojn de zinko, plumbo, kupro kaj aliaj. Certiginte elementojn de la malpura akvo, ili trovis rimedojn por trakti ĝin. Ili konstruis precipitan basenon kaj kondukis en ĝin la malpuran akvon, por ke metalaj jonoj precipitiĝu kaj rezina fenolo vaporiĝu post sunumado. Tiamaniere malutilaj substancoj foriĝis, la malpura akvo kun nutrozaj substancoj fluas en fiŝbredajn lagetojn, kaj krome la precipitaĵo povas esti uzata kiel sterko.

Ili unue kondukis malpuran akvon en unu lageton por fari eksperimenton. En la malpura akvo fiŝoj vigle naĝas por akiri nutraĵon kaj bone kreskas. Poste ili konstruis kanalojn por interligi lagetojn.

Dank' al utiligo de malpura akvo la pomua produktokvanto de fiŝoj pliiĝis de pli ol 200 kilogramoj ĝis ĉirkaŭ 500 kilogramoj. Krome, la brigado ĉiujare povas ŝpari pli ol 250,000 kilogramojn da sterko kaj pli ol 700 labortagojn, kio forte subtenas la agrikulturon. En la praktiko la komunumanoj komprenis, ke kvankam fiŝo kaj rizo havas sian respektivan partikularecon, tamen en sia kreskado ili ambaŭ bezonas sterkon. Malpura akvo povas grasigi kaj grundon kaj akvon, tial oni povas uzi ĝin por kulturi rizon kaj bredi fiŝojn.

KIEL ELOVIĜIS FIŜIDOJ?

Antaŭ 1965, Hihucun-brigado mem ne scipovis kulturi generajn fiŝojn kaj arte elovigi fiŝidojn, tial ĝi ĉiujare devis elspezi pli ol 10,000 juanojn por aĉeti fiŝidojn, kies specoj estis malmultaj. Por solvi tiun problemon ili decidis mem zorgi pri eloviĝo de fiŝidoj.

Post eksperimento ili elkulturis generajn fiŝojn. Kiam venis la tempo de ovumado, la fiŝoj kun malmola ventro ne ellasis ovojn. La eksperimento malsukcesis.

Kie kuŝis la kaŭzo? La kadroj kaj komunumanoj faris detalan analizon, ĉerpis lecionon el la malsukceso kaj daŭre esploris diversajn kondiĉojn kaj faktorojn akcelantajn ovumadon de fiŝoj. Prezidanto Maŭ instruas: "Ĉu materiisma dialektiko



Komunumanoj prizorgas fiŝeloviĝon en cirkla baseno.

ekskluzivas eksterajn kaŭzojn? Neniel. Materiisma dialektiko konsideras, ke eksteraj kaŭzoj estas la kondiĉo de ŝanĝo kaj internaj kaŭzoj estas la bazo de ŝanĝo, kaj ke eksteraj kaŭzoj efikas nur pere de la internaj." Ovometo de kokino kaj anasino edifis iujn komunumanojn. En malvarma klimato kokino kaj anasino malfrue ellasis ovojn, tamen frue en varmeta klimato, tio signifas, ke temperaturo certgrade influas ovometon. La komunumanoj do instalas apud la eloviĝa baseno protektaĵon kontraŭ vento faritan el plasta membrano, same kiel oni starigis ĉe bedoj kontraŭventan baraĵon por protekti plantidojn. Iuj komunumanoj analizis vivan kondiĉon de generaj fiŝoj dum la ovumado en fluanta akvo, masonis per brikoj cirklan basenon por ke akvo cirkulu por krei konvenan kondiĉon



Ili ekzamenas kreskadon de algoj en fiŝbaseno.

por ovumado de generaj fiŝoj. Aliaj komunumanoj trovis, ke tro grasa akvo malbone influis la ovumadon. Ili do atente preparis nutraĵon por preventi al generaj fiŝoj plimultiĝon de graso en periodo de ovumado. Dank' al tio generaj fiŝoj sukcese el-lasis ovojn kaj fiŝidoj eloviĝis.

Poste la kadroj kaj komunumanoj faris eksperimentojn pri hibridigo de fiŝoj por elkulturi bonkvalitajn specojn kaj ankaŭ akiris sukceson en tio. Ekzemple, la loka karmo estas ŝatata de la popoloj, tamen ĝi estas malgrasa kaj ĝia kreska periodo longa. En suda parto de nia lando troviĝas orkarmo, kiu estas grasa kaj altprodukta kaj bezonas mallongan kreskan tempon, tamen ĝia koloro ne estas tiel ŝatata de la amasoj. En eksperimento ili hibridigis la lokan karpon kun la orkarmo kaj elkulturis novspecan fiŝon, kiu ne havas la oran koloron, sed konservas bonkvaliton de mallonga kreska periodo kaj grasa korpo. Krome ili elkulturis aliajn bonkvalitajn specojn.

Ekde 1967, Hihucun-brigado jam havas superfluajn fiŝidojn kaj helpas per ili aliajn brigadojn kaj komunumanojn en fiŝbredado. Komunumanoj diris el kora profundo: "Scio kaj kapablo ne falas de la ĉielo, ankaŭ ne estas propraj al la cerbo. Konado de ĉiu ajn vero venas de praktiko."




RAPIDA DISVOLVIĜO DE PROJEKCIADO DE FILMOJ EN LA TIBETA AŬTONOMA REGIONO

Sub direktado de la proletara revolucia kultura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ, rapide disvolviĝas la projekciado de filmoj en la Tibeta Aŭtonoma Regiono. Nun, en la tuta regiono estas pli ol 170 kinogrupoj kaj pli ol 500 filmoprojekciistoj. Ĉiuj subregionoj kaj urboj jam havas filmodistribuejon kaj kinejojn, ĉiuj gubernioj kaj parto de la subgubernioj jam havas kinogrupon.

Antaŭ la Liberiĝo, nur Lhasa havis kinejon, kiu servis ekskluzive al la reaktiva reganta klaso. Post la demokratia reformo, por kontentigi la bezonon de la vastaj amasoj pri politika kaj kultura vivo, la Partio kaj popola registaro sendis al Tibeto specialajn laborantojn kaj kinematografajn ekipaĵojn kaj elkulturis multajn lokajn nacimalplimultajn kadrojn de filmodistribuo, kaj fondis diversnivelajn organizojn por distribuo kaj projekciado de filmoj. Nuntempe plejparto de la kadroj laborantaj en ili estas gefiloj de liberigitaj tibetaj kamparanoj kaj paŝtistoj. Ili rapide kreskas sub la nutrado de Maŭzedongpenso. Ili ofte portas filmojn al loĝejoj de tibetanoj grimpinte montojn kaj trapasinte riverojn, por ke kamparanoj kaj paŝtistoj povu rigardi ilin ĉe sia hejmo. La kinejoj de Lhasa kaj la pli ol 20 kinogrupoj de la 12 antaŭurbaj gubernioj konstante servas al la komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo, laboristoj de fabrikoj kaj minejoj, kamparanoj kaj paŝtistoj. Antaŭ projekcio de filmo ili prezentas ĝian enhavon kaj ĝiajn ĉefajn personojn per la tibeta lingvo al la rigardantoj por ke ili komprenu la filmon. Kaj dum la projekciado, ili interpretas la parolojn en la tibeta lingvo.

BONA EFIKO EN KURACADO DE INFANA PNEŬMONITO

En kuracado de infana pneŭmonito, la pediatria fako de la Pekina Amikeca Hospitalo akiris bonan efikon per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino. En 1971, ĉirkaŭ 96% de la kuracitaj kazoj sukcesis. Pli ol cent kuracitaj infanoj de akuta astma pneŭmonito ĉiuj estas resanigitaj. La kuraca periodo mallongiĝis de ĉirkaŭ 1 semajno ĝis iom pli ol 4 tagoj. La infana pneŭmonito estas ordinara kaj ripetema malsano, kiu serioze minacas la vivon de infanoj. Por protekti la sanon de infanoj, la kuracistoj kaj flegistinoj de la pediatria fako de la Pekina Amikeca Hospitalo komencis kuraci jam en 1967 infanan pneŭmoniton per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino. Ili aplikis ĉinan medikamenton kiel ĉefan rimedon kun injekto de likvo kaj fortigo de la koro laŭ okcidenta medicino en aldono kaj unuapaŝe resumis du efikajn fundamentajn metodojn.



La Longmen-a kaverno de ŝtonskulptaĵoj de Luoĵang, Henan-provinco estas unu el la plej grandaj artaj trezorejoj de Ĉinio. Ĝi estas bone protektata de niaj registaro kaj popolamasoj. Jen laborantoj de la Longmen-a Protektejo de Historiaj Restaĵoj riparas la skulptaĵojn.



Ŝaĉeng-komunumo de Fuding-gubernio, Fugian-provinco estas triflanke ĉirkaŭata de maro. Utiligante tiun naturan kondiĉon, ĝi disvastigas ĉiujare la plantareon de laminario kaj ĉijare akiris riĉan rikolton de 1,400 muoj da laminario.



Elefantino "Banna"

VEN HUJ

la sovaĝaj elefantoj ŝatas aktivi grupe. Dum irado vir-elefantoj estas en la fronto, elefantidoj en la mezo kaj elefantinoj en la malantaŭo. Kiam ili rimarkas suspektindaĵon, la elefantinoj tuj volvas siajn idojn per rostro por fuĝi, kaj la vir-elefantoj staras firme por batali kontraŭ malamiko. Tial estas tre malfacile kapti elefanton eĉ per enfalilo. Tiam ili decidis kapti elefanton per anesteza pafilo.

Vespere de la 1-a de majo de la pasinta jaro, la lokanoj rimarkis elefantaron sur monto kaj tuj sciigis tion al la taĉmento. En la sekvanta frumatenato, akompanate de plotonestro de ĈPLA Vang Ĝikjuan, la vicestro de la taĉmento Vang Ĝanhaj kaj aliaj kamaradoj serĉadis inter sovaĝaj herboj altaj je homa staturato. Transpasinte plurajn montpintojn ili fine trovis elefanton kun ĝia ido. Rimarkinte homojn, la ido tuj forfuĝis kaj ankaŭ la granda elefanto forfuĝis al alia direkto. Vang Ĝanhaj kaj Vang Ĝikjuan tuj postkuris la idon. Sur la vojo, Vang Ĝanhaj subite rimarkis je tri metroj fore la elefanton, kiu venas por sia ido. Ĝi svingis sian rostron kaj sin direktis al li. En urĝeco, Vang tuj pafis al la elefanto, tamen la anesteza injektilo rompiĝis. Kaj en tiu kriza momento, plotonestro Vang Ĝikjuan pafis per karabeno. La elefanto sin turnis sur tero kaj kuris for.

Poste, la taĉmento plurfoje renkontis sovaĝajn elefantojn, tamen ili neniun kaptis pro malsukceso de anestezo. Tiam, ili serioze resumis sperton kaj ĉerpis lecionon en elefantkaptado, pluapaŝe konis la aktivan leĝon de la sovaĝaj elefantoj kaj pli bone uzis novan anestezilon.

La 21-an de oktobro, 1971, apenaŭ elkrepuskiĝis, la taĉmento ekiris kun elefantkaptiloj kaj teleskopoj laŭ la direkto montrita de la lokanoj. Sekvante la piedsignojn de elefantoj, ili transiris monton post monto kaj ĝis la 3-a horo de posttagmezo, ili fine trovis elefantaron. Unue ili aŭdis krakadon en la arbaro. Ili antaŭeniris kaj vidis: Tuj elefantoj rompas per rostro mos-bambuojn kaj arbojn unu

EN la elefanta ekspoziciejo de Higiaŭ-parko en la okcidenta antaŭurbo de Ŝanhajo, troviĝas nova fortika kaj vigla juna elefantino nomata "Banna". Ĝi estas ĉirkaŭ 8-jara kaj je 1,500 kg. peza.

De kie venis la elefantino?

En Mengjang de la Hiŝuangbanna-a Aŭtonoma Subprovinco, Junnan-provinco de Ĉinio, sin trovas praarbaro sur montaro alta je pli ol 2,000 metroj super la marnivelo, kiu estas natura zoologia ĝardeno. Tie generiĝas malmulte trovebla sovaĝa elefantaro kaj diversspecaj raraj birdoj kaj bestoj, tamen, malofte frekventas homoj kaj iun lokon eĉ ĉasistoj ne atingis. Ĉifoje, la ŝanhaja elefantkapta taĉmento venis tien kaj ricevis grandan zorgon kaj subtenon de la loka registaro kaj garnizona trupo, kiuj sendis vojkondukajn ĉasistojn kaj protektantojn al la taĉmento.

La taĉmentanoj surgrimpis montojn kaj transiris riverojn, kaj post observado de kompare longa tempo ili rimarkis ke la sovaĝa elefanto estas nature spriteca. Kiam ĝi rimarkis ion suspektindan, ĝi iom fositis per la rostro kaj poste forfuĝis. Krome

post alia kaj kun bona apetito manĝas branĉojn kaj foliojn, aliaj blekas, kio vekas eĥojn en la montvalo, kaj triaj staras kviete svingante rostron. Por eviti atakon de la elefantaro, la taĉmentanoj dividis sin en du grupojn kaj senbrue proksimiĝis al la elefantaro. Sed la elefantoj tuj forfuĝis kiam ili aŭdis ion. Tial ili refoje serĉis en ĉielkovra arbaro. Post duonhoro, ili ree trovis la elefantaron kaj sieĝis ĝin de du flankoj. Kamarado Taŭ kaj ĈPLA-ano Eta Ĝoŭ surgrimpis iun arbegon por atendi la elefantaron. Iom poste, iu elefantino venis kun sia ido. Pro tro altaj herboj kaj arboj, Taŭ trovis nenian ŝancon por pafi. Tiam, ankaŭ alia juna elefantino venis kaj atingis pafdistancon. Taŭ tuj trafis ĝin per anesteza pafilo. Tiam aliaj elefantoj aŭdis sonon kaj tuj forfuĝis. Tiu juna elefantino komence surpriziĝis kaj poste sekvis la aliajn kun alte levitaj oreloj, tamen, ĝi iom post iom malrapidigis siajn paŝojn.

Tiam du grupoj kuniĝis kaj sekvis la trafitan elefantinon. Sur montdeklivo, ili trovis ke la elefantino jam falis en kavon kaj senĉese balancis la piedojn en angoro. La taĉmentanoj tuj malvenenigis ĝin per injekto kaj ligis ĝiajn membrojn per ferkateno, nilona ŝnurkateno kaj kotonfadena ŝnuro, kaj poste fiksas ĝin al arbego per ŝnuro. Post pli ol 9 horoj, la elefantino iom post iom rekonsciiĝis.

Sekve, la taĉmentanoj ekokupis sin per streĉa eksterdoma dresado. Ĉe la komenco, ili pretigis rizaĵon por la elefantino, tamen ĝi prenis ĝin per rostro kaj forĵetis aŭ piedpremis ĝin. Poste, ili rimarkis, ke la elefantino ŝatas manĝi dolĉaĵojn, kaj ili do miksis sukeron kun la rizaĵo kaj knedis ĝin en rizbulojn. Kiam ili donis al la elefantino la bulojn, la lasta tuj metis ĝin en sian buŝon per rostro.

Sed, la sovaĝa naturo de la elefantino ankoraŭ ne estis tute ŝanĝita. Ĝi tuj volvis per rostro kaj piedbatis vin, kiam vi iom proksimiĝis al ĝi. Iufoje, kiam la taĉmentano Eta Hua nutris ĝin per rizaĵo, ĝi jen etendis sian rostron, jen ĝin retiris, kaj poste ĝi subite forprenis la rizaĵon de lia mano. Tiu neatendita fenomeno pensigis ĉiujn. Post analizo, ili rimarkis diferencon inter kaptita kaj sovaĝa elefantoj. La kaptita elefanto rostrvolvatas kaj piedbatas homojn ne por vundi ilin sed por sin protekti. Tial, ili ĉiutage nutris ĝin per bongustaĵoj kaj per broso ĝin gratis kiam ĝi jukis. Tiamaniere, la elefantino estis iom post iom dresita.

Post kelkaj tagoj, sub la helpo de la lokanoj, la taĉmentanoj pelis la elefantinon al la ŝoseo kaj metis ĝin sur kamionon post granda penado. Kaj fine oni transportis ĝin per vagonaro al Ŝanhajo. Nun, la elefantino komencis sian novan vivon en la nova cirkonstanco.

Protektejo de sovaĝaj bestoj en Mengjang, Hiŝuangbanna.






Sovaĝa elefanto ŝutas teron per la rostro sur sian dorson por kamuflo.



La taĉmentanoj devas tagnokte dresi ĝin dum kvar monatoj en la arbaro por povi ĝin transporti el la montaro.





La elefantino rimarkis ĉasistojn kaj furioze sin ĵetis al ili, sed ĝi estis trafita de anesteza injektilo.



Post la rekonsciigo de la elefantino, la ĉasistoj devas trinki kaj manĝigi ĝin per bambua tubo pro ĝia sovaĝeco.




La elefantino estas kondukata el la arbaro.



La elefantino estas metita en kamionon, kaj ĝia nova vivo komenciĝas.

Mebloj el Malmola Ligno

GING JI



FREMDLANDAJ amikoj, kiuj vizitis la Malnovan Palacon en Pekino, ofte aprezis kun plezuro la elmontratajn meblojn faritajn el malmola ligno en Ming- kaj King-dinastioj (1368-1644 kaj 1644-1911 respektive). Ili trovis ke tiuj mebloj estas klare kaj agrable konstruitaj en stilo simpleca. En pritrakto de la materialo, la propra beleco de la ligno estas karakterize montrata en ĝia pleno.

La arto de meblokonstruado de Ĉinio originas el la tradicio de la antikva arkitekturo lignostruktura. Ĝia formo sentigas trankvilecon, stabilecon kaj agrablan senornamecon kaj donas naturan komforton. En la aranĝo de proporcio inter partoj kaj la tuto, en apliko de dekoracio kaj ornamado, ĝi estas tre zorge pripensita. La kunigoj estas faritaj per mortezoj kaj tenonoj sen uzado de metalaj najloj. La surfaco estas spegule glatigita per frotado kaj polurita per vakso, tiel ke la beleco de la ligno mem estas plene videbla.

La karakterizaĵo de strukturo de tiuj mebloj estas la metodo de enfikso de platoj en la kanelojn de tenone kunigita kadro. La enkadriĝo estas precize farita, tamen, kun necesa tolerebleco por etendiĝo de la ligno kaŭzota de vetervariado. Skulptaj ornamoj estas faritaj al iuj specoj de mebloj, ĝenerale, el kelkaj t.n. nub- kaj brokat-desegnoj

kaj tiuj de floro, herbo, birdo kaj besto kun la ĉina tradicia stilo.

La metalaj akcesoraĵoj uzataj sur la mebloj el malmola ligno estas ekskluzive el latuno, kio ne nur kontentigas iliajn strukturajn bezonojn, sed ankaŭ kontribuas per sia koloro kaj brilo en plibeligo de tiuj mebloj.


Ĉe la piedoj de iuj mebloj estas videblaj formoj devenantaj de tiuj de bronzaĵoj antaŭ jarmiloj, tamen, evoluintaj en sian apartan stilon sub la influo de la uzata materialo.

Por fari tiajn meblojn necesas ne nur bona metiarto, sed ankaŭ bona materialo. Uzataj estas nur la rozligno (*Pterocarpus indicus*) kaj palisandro, kiuj estas malmolaj, fortikaj kaj kompaktaĵoj kaj posedas la kvaliton rezisteman kontraŭ vetervariado kaj longa uzado. Ili havas pezan ruĝbrunan koloron kun natura brilo kaj ne bezonas koloran lakadon.

Por plibeligi tiajn meblojn oni ankaŭ uzas klozoneajn, porcelanajn aŭ marmorajn platojn.

Pro la ŝato kaj akceptemo ĉiam montritaj de ekster-landaj uzantoj, en Pekino starigis speciala fabriko por daŭre produkti tiajn meblojn. Ĝiaj produktaĵoj ne nur heredis la bonajn karakterizaĵojn

de Ming kaj King, sed ankaŭ disvolvas tiun metiarton konforme al la modernaj belarto kaj vivbezonoj. Ekzemple, la formoj restas simplaj, sed ne monotonaj; la korpoj ne estas pezaj, nek malfortikaj; krom Ming-stilaj ŝrankoj, ĉin-stabloj (*ĉin*—ĉina antikva kordmuzikilo horizontale kuŝanta dum ludado) seriaj tetabloj ktp., estas produktataj ankaŭ sofaj tabloj, softipaj seĝoj, koktelaj ŝrankoj kaj meblaroj por salonoj kaj manĝoĉambroj.



Mebloj el malmolaj lignoj por manĝoĉambro

La Infanaĝo de Olunĉunoj

KUN granda ĝojo ni vizitis la Elementan Lernejon de Vulubutie de Gankuj-popolkomunumo en la regiono de la Granda Hing-an-montaro.

Kiam ni enpaŝis la lernejon, ĉie ni sentis kvietecon kaj aŭdis nur sonorajn voĉlegadon de la lernantoj.

En la lerneja oficejo, instruistino Linmaj varme nin akceptis kaj detale prezentis al ni la lernejon. Kiam ŝi parolis pri la feliĉo de la olunĉunaj infanoj, ŝi nature ekmemoris la suferojn de la olunĉunoj en la pasinteco.

Antaŭ la Liberiĝo, la olunĉunoj ne havis siajn urbetojn kaj vilaĝojn por koncentra loĝado. Ili—unu familio sole aŭ kelke da familioj kune—vagaĉadis tutjare en vastaj arbaroj kaj vivis primitivan vivon. Ili manĝis viandon de sovaĝaj bestoj, sin vestis per peltoj kaj loĝis en tendoj. Post la Liberiĝo, dank' al la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ, la olunĉuna popolo konstruis multajn ĉasistajn vilaĝojn profunde en arbaroj.

Post fiksloĝiĝo la olunĉunoj sinsekve fondis elementajn lernejojn en siaj produktaj grupoj de komunumoj. Unu el ili estas la Elementa Lernejo de Vulubutie, en kiu nun laboras tri instruistoj kaj lernas pli ol sepdek geknaboj, el kiuj pli ol duono estas olunĉunoj. Ĉiuj olunĉunaj lernantoj povis ricevi stipendion kaj senpagan kuracon de la ŝtato kaj esti privilegie akceptitaj en mezlernejon.

Sonorado signalis la finiĝon de leciono. La geknaboj tuj amase rapidis el la klasĉambroj al la sportejo, kie ili vigle kaj gaje kuris kaj saltis. La knaboj ludantaj piedpilkon galopis kiel petolaj ĉevaloj. Kaj la knabinoj ludantaj trapezon ŝvebis kiel birdoj.

Kun profunda amo rigardante la geknabojn, kamaradino Linmaj diris emocie: “Kiel feliĉe vivas la olunĉunaj geknaboj hodiaŭ!” En nia interparolo ni eksciis, ke ankaŭ kamaradino Linmaj estas olunĉuno kaj unu el la unua generacio de olunĉunaj lernantoj post la fondiĝo de nia popola respubliko. Tial ni petis ŝin rakonti al ni kiel ŝi lernis siatempe.

Ŝi diris: Post kiam stariĝis la Olunĉun-a Aŭtonoma Hoŝo en 1951, fondiĝis la kompleta elementa lernejo en Hiaŭ-ergoŭ kaj en la sama jaro pli ol sepdek geknaboj iris en ĝin por lerni. Tiam mi estis apenaŭ sepjara kaj sentis neesprimeblan ĝojon, ĉar mi antaŭe eĉ ne kuraĝis sonĝi pri lernado. Tiam laborgrupo sendita de la popola registaro transpasis montojn kaj riverojn por venigi olunĉunajn geknabojn por lerni, rajdante ĉevalojn kaj direktante ĉarojn. Ĉiuj iliaj vivbezonaĵoj kaj loĝejoj estis senpage provizataj de la ŝtato. Je la komenco aŭ fino de vintra kaj somera libertempoj la instruistoj akompanis la lernantojn iri hejmen aŭ reveni al la lernejo. En la lernejo trovis sin ankoraŭ sanprotektaj laborantoj por kuraci malsanojn de la lernantoj.

Parolante pri la feliĉa vivo de la olunĉunaj geknaboj, kamaradino Linmaj tiel emociiĝis, ke ŝi ne povis trovi taŭgajn vortojn por esprimi sian dankemon al la Partio kaj Prezidanto Maŭ. Kiam ni elmetis nian peton ke ŝi rakontu la suferojn de la olunĉunaj geknaboj antaŭ la Liberiĝo, ŝi iom meditis kaj ekrakontis la malfeliĉojn de la patro de lernanto de la kvina klaso Moergenbuku antaŭ la Liberiĝo.

Nun Gincaj, la patro de Moergenbuku, estas trideknaŭ-jara. Li vivis malpli bone ol ŝarĝbruto de la infanaĝo. Antaŭ la Liberiĝo malfeliĉo trafis la olunĉunajn infanojn, tuj post ilia naskiĝo. Tiam

infanonasko de virinoj estis konsiderata kiel malbona aŭguro kaj akuŝinta virino ne devis intervidiĝi kun ĉiu ajn por tri tagoj; cetere ŝi devis loĝi en aparta tendo portempe farita kaj preni manĝaĵon alportitan de ŝia familiano per bastono. Pro manko de akuŝistino kaj prizorgo nemalmultaj beboj mortis de frosto, malsato kaj malsanoj. Se bebon trafis morbito, oni povis fari nenion por savi ĝin de morto. En la malnova obskura socio mortis pli ol 50% de la olunĉunaj beboj. Kvin el la ses gefratoj de Gincaj mortis en sia infanaĝo.

La patrino portis Gincaj en lulilo, kiam li estis 1-2-jara. Kiam li fariĝis 3-4-jara, li estis metita en felsakon kaj portata sur ĉevalo. Kiam li atingis la aĝon de 5-6 jaroj, li rajdis kaj vagadis kune kun la patro. Kiam Gincaj estis sepjara, malsano forrabis la vivon de lia patro. De tiam li devis vivteni la patrinon suferantan de malsanoj kaj fratineton kvin-monatan. Li prenis la ĉaspafilon postlasitan de la patro kaj ne havante ĉevalon devis ĉasadi surpiede. Kiam li akiris nenian ĉasaĵon, li devis pleniĝi sian stomakon per herbradikoj. Kruele komercistoj ŝanĝis felon de kapreolo kontraŭ nur bovlo da milio kaj ĉinĉilan pelton kontraŭ bovlo da salo. Ofte okazis, ke Gincaj tute ne havis salon por pluraj monatoj. Li havis nur unu malnovan peltan pantalonon. Ĝin portante Gincaj suferis de malvarmo en vintro kaj de varmo en somero. Sekigitte post pluvo ĝi malmoliĝis kaj vundis la femuron de Gincaj pro frotado.

Tiam la olunĉunaj popolanoj pene baraktis kontraŭ la morto kaj iliaj infanoj eĉ neniam vidis libron por ne paroli pri lernado. Ĉiuj olunĉunoj estis analfabetoj escepte de malmultaj el ili kiuj iomete sciis la hanan kaj mongolan lingvojn.

Tion dirante, kamaradino Linmaj pleniĝis de indigno. Tamen kiam ni demandis pri ilia nuna vivo, sur ŝia vizaĝo aperis rideto.

Tondregis la revolucio, malaperis la nigraj nuboj kaj ekbrilis la suno. Kun la venko de la Kontraŭ-japana Rezistmilito, Prezidanto Maŭ liberigis la suferplenan olunĉunan popolon. En 1947, oni organizis ĉi tie la kurson por kulturado de junaj olunĉunaj kadroj, kies unua kursanaro nombris pli ol tridek gejunulojn. Poste la Partio sendis nemalmultajn olunĉunajn gejunulojn al Ĝalanail kaj Ulanhoto kaj aliaj lokoj por lerni, kaj Gincaj estis unu el ili. Post fino de la lernado li revenis al sia hejmloko kaj laboris entuziasme por rapide ŝanĝi ĝian postĝintan fizionomion kaj en 1956 li glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Nun Gincaj laboras en la forstuma sekcio de la komu-

numo. Li havas kvar infanojn: Moergenbuku, lia pli aĝa filo havas aĝon de 14 jaroj ĉijare, lia dekdujara filino Hehua estas lernantino en la kvara klaso, la dua dekjara filo Batu estas lernanto de la dua klaso kaj ankaŭ la plej juna filo Moergenbajin lernas en elementa lernejo. La totala enspezo de la tuta familio nombras je 150 juanoj. Ĉiuj membroj de la familio havas proprajn vintrajn kaj some-rajn vestojn kaj vivas tre feliĉe.

En la damninda malnova socio, la olunĉunaj infanoj similis al velkantaj herboj turmentataj de ŝtormo. En la nova socialisma Ĉinio, la olunĉunaj infanoj similas al printempaj floroj disflorantaj bele kaj feliĉe dank' al nutrado de Maŭzedongpenso. En la lastaj pli ol dudek jaroj, olunĉunaj lernantoj iris nombron post nombro al la frontoj de nacidefendo kaj konstruado de la patrolando post fino de lernado. Iuj el ili fariĝis traktoristoj, ŝoforoj, oficiroj kaj soldatoj de ĈPLA, kaj aliaj fariĝis popolaj instruistoj, medicinaj laborantoj kaj ŝtataj sportistoj. Multaj olunĉunaj kadroj sinsekve suriris gvidajn postenojn de diversaj niveloj kaj senĉese marŝas antaŭen sur la vojo de daŭra revolucio kondukante la vastajn amasojn.

Aŭskultu

Esp-an Disaŭdigon

de

Radio Pekino

Por Eŭropo

| | |
|----------|----------------------------------|
| GMT | Vendredo k Sabato 20:00—20:30 |
| Ondoj(m) | 47 45 31 25 |

Por Japanio, Koreio

| | |
|--------------|---------------------------------|
| Pekina Tempo | Sabato k Dimanĉo 19:00—19:30 |
| Ondoj(m) | 47 40 |

Por Sudorienta Azio

| | |
|--------------|---------------------------------|
| Pekina Tempo | Sabato k Dimanĉo 20:30—21:00 |
| Ondoj(m) | 25 19 |

La Ĉina kaj Albana Popoloj

Interligiĝas Koro kun Koro

La 29-an de aprilo, 1972, la Baleda Trupo de la Opera Teatro de la Albana Popola Respubliko sub la gvido de Mantho Bala, vicministro de edukado kaj kulturo kaj prezidanto de la Arta kaj Kultura Komitato, venis al Ĉinio por fari prezentadan vojaĝon laŭ invito de la Ĉina Popola Asocio de Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj ricevis varman bonvenigon.

La Baleda Trupo de la Albana Opera Teatro vizitis Pekinon, Ŝanhajon, Nankinon, Ŝaŭŝan kaj aliajn lokojn kaj rigardis fabrikojn, popolajn komunumojn kaj lokojn kun pitoreska pejzaĝo aŭ historia restaĵo.

En Ĉinio la Baleda Trupo de la Albana Opera Teatro ludis la duaktan baledon *Monta Knabino* kaj revoluciajn muzikaĵojn. La moderna baledo *Monta Knabino* spegulas la firman bataladon de la heroaj albanaj virinoj kontraŭ klasaj malamikoj kaj rutinaj fortoj por la liberigo de virinoj, laŭ la instruo de la Albana Partio de Laboro, kaj estis varme akceptita de la ĉinaj rigardantoj.

La prezentado de la Baleda Trupo de la Albana Opera Teatro havigis al la ĉina popolo ŝancon propraokule vidi eminentan arton de la albanaj artistoj kaj havigis al ni ŝancon lerni de ili. Tio plifortigis la revolucionan amikecon kaj batalan unuiĝon inter la artaj laborantoj de Ĉinio kaj Albanio.

Varma bonvenigo al la albanaj kunbatalantoj





La monta knabino kaj ŝiaj amikinoj gaje dancas en libero kaj feliĉo.

En la Muzeo de la Malnova Palaco de Pekino





Rigardo al anasoj en la Popola Komunumo de Ĉina-Albana Amikeco de Pekino

Sceno pri agroreformo de la baledo *Monta Knabino*





Ĉinaj kaj albanaj artaj laborantoj ĝoje celebras la Feston de la Unua de Majo en Pekino.



Sur la Vojo de Kombiniĝo kun Laboristoj kaj Kamparanoj

JAM pli ol 30 jarojn, mi okupiĝas pri laboro por kulturi bonspecion de tritiko. Dum tiuj jaroj mi travivis du malsamajn epokojn de la malnova kaj nova Ĉinio. Mi havis profundan konon, ke nur sub la socialisma sistemo la scienco kaj tekniko povas vere servi al la popolo kaj plene ludi sian rolon.

Antaŭ la Liberiĝo, en Guanĝong-regiono de Ŝenhi-provinco la pomua produkto de tritiko estis nur 35-40 kg. pro serioza atakado de tritikaj rusto kaj kuleto. Tiam la vasta laboranta popolo vivis tre mizere sub la reakcia regado de Kuomintango. Tio vekis en mi profundan simpatian. Influite de la burĝara slogano "savi la patrolandon per scienco", mi opiniis, ke la laboranta popolo povus plibonigi sian vivon, se nur oni havus bonspecian tritikon kaj altigus produkton de tritiko. Pro tio mi decidis kulturi malsanimunan, finsekte-rezistan kaj altproduktan bonspecion de tritiko. Dank' al lernado de sperto de kamparanoj kaj multjara eksperimentado kaj venkinte diversajn malfacilojn, mi elkulturis rustimunanan kaj altproduktan bonspecion de tritiko "Bima n-ro 1" kaj kontraŭkuletan bonspecion "6028". Mi pensis, ke ambaŭ bonspecioj certe estos rapide disvastigitaj kaj ludos sian rolon en produkto, kaj mi sentis min neeldireble ĝoja. Sed mia espero tuj vaporigis. La kuomintangana reakcia registaro neniam zorgis pri la vivo de la laboranta popolo kaj tute ignoris sciencan studon. La elkulturitaj bonspecioj de tritiko "Bima n-ro 1" kaj "6028" altiris al si nenian atenton de ĝi, de tio mi estis tre deprimita.

Kiam mi min trovis en dilemo, Ŝenhi-provinco estis liberigita. La popola registaro transprenis la Nordokcidentan Agrikulturan Instituton. La trian tagon post la transpreno, respondeculoj de la instituto, malgraŭ sia okupateco, persone venis al mia laborejo paŝinte kelkajn kilometrojn, informigis pri mia eksperimentado kaj interkonsiliĝis kun mi pri la disvastigo de "Bima n-ro 1". La instituto disponigis al mi pli ol 300 muojn da tero por tritikokultura eksperimento, kaj krome la ŝtato starigis

pli ol 1,200 eksperimentajn punktojn en Guanĝong-regiono kaj asignis sumon da mono specialan por tiu celo. Sub la prizorgo de la Partio kaj ŝtato, "Bima n-ro 1" rapide estis disvastigita en Guanĝong-regiono de Ŝenhi kaj en la meza kaj malsupra baseno de la Flava Rivero, kio rapide altigis produktan kvanton de tritiko de tiuj regionoj.

Mi faris nur kion devis mi kiel sciencisto, sed la Partio kaj popolo donis al mi grandan gloron. Aŭtune de 1950, mi partoprenis en la Tutlanda Kongreso de Laboraj Modeloj de Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj. Estas neforgeseble por mi, ke en la kongreso mi feliĉe vidis grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. La akcepto de Prezidanto Maŭ donis al mi neelĉerpeblan forton. Mi decidis pli bone servi al la popolo.

En printempo de 1953, kiam mi venis al iu loko por esploro, mi trovis, ke 6028-tritikaj plantoj de ĉirkaŭ mil muoj trafis seriozan froston. Mi tre maltrankviliĝis kaj proponis al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ke ili forplugu la tritikon kaj semu alian grenon, timante, ke la reduktiĝo de la tritika produktokvanto malbone influos mian reputacion. Sed ili ne aprobis mian opinion, dirante: "Nun ni, kiel mastroj de la lando, devas ĉiurimede savi la tritikon!" Ilia vorto multe skuis mian animon kaj konsciigis min, ke la intelektuloj ne povus havi komunan lingvon kun la laboranta popolo, se ili ne klopodus reformi sian malnovan ideologion. De tiam mi konscie iris al praktiko kaj profundiĝis en amasojn por lerni de ili kaj diligente reformi mian mondkoncepton.

Post vasta semado de "Bima n-ro 1", mi havis ĉiam pli multajn amikojn. Iuj skribis al mi leterojn de malproksime, aliaj persone venis al la instituto post kelkdek-kilometra paŝado por konsiliĝi kun mi, kaj triaj invitis min al kamparo por kune kun ili solvi problemojn en produkto. La vastaj kontaktoj kun komunumanoj estas por mi tre bona ŝanco por lerni de ili, tiel ke mia spirita fizionomio iom post iom ŝanĝiĝis kaj mia proletara konscio plie altiĝis. Mi komencis rilatigi mian laboron kun

la granda celo de komunismo kaj decidis batali por la komunisma afero dum la tuta vivo. En 1956, mi glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio.

En la 11-a Sesio (Plivastigita) de la Plej Alta Ŝtata Konferenco kaj la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri la Propaganda Laboro okazigitaj en 1957, mi propraorele aŭdis gravajn paroladojn de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ diris: **“Ĉar la intelektuloj devas servi al la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, antaŭ ĉio ili devas kompreni ilin, bone koni ilian vivon, laboron kaj penson. Ni stimulas, ke la intelektuloj iru inter la popolamasojn, al fabrikoj kaj kamparo.”** La instrukcio de Prezidanto Maŭ pliapaŝe montris al ni la direkton de antaŭenmarŝado kaj pliiĝis mian decidemon kaj kuraĝon profundigi en kamparon por longtempe hardi min. En 1958, mi vivis ok monatojn en kamparo. En fizika laborado malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj forte edifis kaj multe edukis min per sia profunda proletara amo al Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio kaj sia revolucia spirito de batalo kontraŭ naturo. Iun nokton, subite pluvegis, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tuj iris al kampoj spite al pluvego por esploro, timante, ke la pluvego detruos la plantaĵojn. Ilia konduto tre kortuŝis min, ke mi longe ne povis min kvietigi. Mi decidis preni malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kiel mian modelon. Poste, ĉiufoje, kiam pluvis aŭ ventis, mi kune kun ili iris al kampoj por fari ian klopodon. Partopreno en la fizika laboro profunde komprenigis min: La intelektuloj ne povus havigi al si sentimenton de la laboranta popolo kaj bone servi al ĝi, se ili ne partoprenus en la fizika laboro kaj ne vivus kune kun ili.

Kun disvolviĝo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, “Bima n-ro 1” jam ne povis


kontentigi bezonon de produkto. Kaj amasoj soife atendis pli bonajn speciojn ol “Bima n-ro 1”. Kiel oni povas rapide plenumi tiun malfacilan taskon? Komunumanoj kreis sperton pri riĉa rikolto de tritiko sur vasta areo. Sub malbonaj naturaj kondiĉoj ili rompis rutinojn kaj elkulturis bonajn speciojn. Tio donis al mi profundan inspiron. Mi profundigis en kamparon kune kun aliaj kamaradoj por lerni de komunumanoj. Ni faris enketon kaj esploron sur altproduktaj kampoj unun post alia en pli ol cent gubernioj de kelkaj provincoj kaj kolektis praktikan sperton kaj diversajn kulturajn metodojn de agrikulturaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj kaj komunumanoj. Surbaze de tio, kunlaborante kun laboristoj de nia kultivejo kaj komunumanoj, post nelonge ni elkulturis bonan specion de tritiko “Riĉa Rikolto n-ro 3”, aplikante metodon de samtempaj kulturado, eksperimentado kaj disvastigo. Ĝi povas rezisti kontraŭ tiga kliniĝo, stria rusto, sekeco kaj inundeco kaj havas bonan kvaliton de grandaj grajnoj, alta produktokvanto kaj aliaj. Tiu bonspecio jam estis disvastigita en la vasta regiono de la meza kaj malsupera baseno de la Flava Rivero, kio pliapaŝe stimulas disvolviĝon de tritika produkto.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **“Se intelektuloj ne kombinas sin kun laboristaj kaj kamparanaj amasoj, ili sukcesos en nenio.”** La tritika kulturado de kelkdek jaroj profunde konigis al mi, ke tiu instruo estas granda vero. Dank’ al la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj kombiniĝo kun laboristaj kaj kamparanaj amasoj, mi povas akiri iujn sukcesojn en la kulturado de novaj tritikaj specioj. Mi antaŭenmarŝos ĉiam laŭ la vojo montrita de Prezidanto Maŭ.

**La aŭtoro estas profesoro de la Nordokcidenta Agrikultura Instituto.*



Ĝaŭ Hongĝang (la dua de dekstre) kaj komunumanoj ekzamenas la kreskadon de tritiko.



En laboratorio

HONG JAN:

Por Sekura Produktado de Karbominejo

EN la fame konata karbomina urbo Fuŝun de nia lando, funkcias la Karbomina Instituto de Liaŭning-provinco por sekura produktado de karbominejo. La fondiĝo kaj disvolviĝo de tiu instituto montris la senkomparan zorgon de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio al sekureco de la karboministoj en produktado.

PRIZORGO DE LA ŜTATO

Antaŭ la Liberiĝo, precipe dum la 40-jara regado super Fuŝun-karbominejo fare de la japana imperiismo, kiu freneze prirabis nian karbominon, la reakciularo tute ne zorgis pri la sekureco de la karboministoj, pro tio ofte okazis gasa eksplodo, akvoelŝpruco, brulego, plafonfalo kaj aliaj. Estis nenia garantio al la sekureco de la ministoj. Laŭ nekompletaj statistikoj de la malamiko kaj pupa reĝimo, de 1916 ĝis 1944 pli ol 250,000 karboministoj de Fuŝun vundiĝis kaj mortis pro akcidentoj, t.e. meznombre 23 en ĉiu tago.

Post la Liberiĝo, Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio tre zorgas pri la sekureco de karboministoj en produktado. Oni ĝenerale faris sekurigajn aranĝojn en minejoj. Por venki teknikajn malfacilojn en radikala forigo de minejaj akcidentoj, en 1953 la ŝtato pligrandigis la Karbominan Instituton de Fuŝun, starigitan de la japana imperiismo dum sia okupado por rabi nian karbon, en la unuan instituton de nia lando por esplori sekurigan teknikon de karbominejo. En la pasintaj 20 jaroj, tiu instituto disvolviĝis senĉese kaj ĝia konstrua areo pliiĝis je pli ol 13-oblo. Antaŭe ĝi povis nur fari elemento-analizon kaj industriajn eksperimenton pri karbo, petrolo kaj riĉa skista mineralo, sed nun ĝi jam havas esplorajn fakojn de sekura produktado pri gaso kaj ventumado, fajroestingo, maŝinoj kaj elektro, pulvo, sinteza utiligo de materialo kaj subĉiela ekspluatado de minejo. Krom senĉesa pliiĝo kaj kulturado de teknikaj laborantoj, la ŝtato ĉiujare asignas al ĝi apartan sumon da mono por aĉeti



La eksplodigaj grupoj interkonsiliĝas en galerio por eviti miseksplodigon.

avangardajn instrumentojn kaj ekipaĵojn laŭ la bezono de esploraj objektoj, kaj provizis al la sciencaj laborantoj altan ŝaktoskafaldon, fabrikan kaj galeriojn por eksperimento.

SCIENCA ESPLORADO EN TRIFLANKA KOMBINIĜO

La granda zorgo de la ŝtato pri sekura produktado de karbominejo multe stimulas la esploristojn de la instituto al aktiva kaj kreiva laborado por socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la spirita fizionomio de la esploristoj multe ŝanĝiĝis, ili iris el la instituto al fabrikoj kaj minejoj por akcepti reedukon de la laborista klaso kaj plibone servi al sekura produktado de minejo. En la lastaj du jaroj,

la instituto sendis 131 teknikajn laborantojn kun esploraj taskoj al 32 fabrikoj kaj minejoj de 13 provincoj kiaj Hunan, Ŝanĥi kaj Ŝiĉuan kaj tie starigis esplorajn rondojn. Ili invitis pli ol 150 laboristojn, kadrojn kaj teknikistojn sur la produkta fronto partopreni en esploraj rondoj, kaj tiuj lastaj kun riĉa praktika sperto kuraĝas forlasi malnovojn kaj krei novojn. Tio multe akcelis la disvolviĝon de la scienca esplorado.

Kelkaj inĝenieraj teknikistoj, kiuj respondecas pri esplorado kaj projektado de vinĉo por oblikva ŝakto, komence opiniis ke ili povas plenumi la taskon per sia scio kaj kapablo sen helpo de laboristoj, kiuj nek vidis vinĉon nek posedas scion pri projekto en ilia imago. Tiamaniere, laŭ sia "racia supozo" ili faris projekton kun tiel nomata avangarda nivelo.

Kiam ili prezentis la projekton al praktika konstruado, laboristoj montris ĝiajn multajn mankojn. El tio ili konis la malutilon de disiĝo de teorio disde praktiko. Poste ili laboris kune kun laboristoj en galerio kaj faris plurajn gravajn reviziojn al la projekto kombinante la saĝon kaj sperton de laboristoj kun sia teknika scio. En malpli ol duona jaro la vinĉo por oblikva ŝakto jam estis sukcese elfarita.

NOVAJ ATINGOJ

Observante la instruon de Prezidanto Maŭ “**En la kampoj de la produkta batalo kaj scienca eksperimento, la homaro ĉiam konstante disvolviĝas kaj ankaŭ la naturo ĉiam konstante disvolviĝas; ili neniam restas sur la sama nivelo**”, la esploristoj de tiu instituto senĉese puŝas sian sciencan esploradon al pli alta nivelo. Por estingi membrulon en galerio, de multaj jaroj oni ĉiam aplikis postgintan metodon en la pasinteco, nome fermi la galerion en brulo per tabuloj kaj argilo. Kamaradoj de la fajroestinga grupo, post pli ol 600 eksperimentoj, kreis novan teknikon, kiu povas facile kaj rapide izoli lokon de membrulo. Sed tiu metodo ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de sekura produkto; ili decidis klopodi por eltrovi rimedon por preventi membrulan katastrofon. La esploristoj venis al ekbrulonta ekspluatejo, faris pli ol 400 eksperimentojn spite de alta temperaturo kaj fumo kaj fine trovis mal-

karan kemiaĵon, kiu povas redukti temperaturon kaj efike estingi ekbrulon. Samtempe kun tio la esplorado pri brido de membrulo akiris certan progreson.

La esploristoj ne kontentiĝis je sia sukceso en eksperimentoj de siaj esploraj objektoj kaj decidis servi la novajn teknikojn al la produktado. La gvidantoj de la instituto entuziasme subtenis la revolucionan postulon de la esploristoj kaj organizis servajn grupojn por ĝeneraligi kaj altigi la novajn teknikojn en fabrikoj kaj minejoj. La kamaradoj de pulva grupo vizitis pli ol 40 fabrikojn kaj minejojn kaj instruis tie al laboristoj teknikon por fari kaj ĝeneraligi sekuran pulvon kreitan de ili malmultekostan kaj pli efikan, kies materialo estas facile akirebla. Foje, kiam komunisto-inĝeniero Liang Juhiang rimarkis, ke tiu pulvo ne tre taŭgas por galerio kun multe da gaso, li persone venis al la koncerna pulva fabriko kaj plibonigis ĝin kune kun laboristoj kaj teknikistoj. En la lastaj du jaroj, tiu grupo, same kiel la aliaj, helpis iujn lokojn, kie oni antaŭe ne povis fabriki tian pulvon, konstrui 6 fabrikojn de sekura pulvo kaj ricevis laŭdon.

En la lastaj du jaroj, el iliaj 35 esploraj objektoj 15 akiris sukceson kaj 10 ricevis gravan progreson, kaj per tio ili faris novan kontribuon al sekura produktado de karboministoj.



Sekuraj eksplodigiloj produktitaj por la minejo

Goja Revido

Jen ĉe la ŝakto sub la ruĝa suno,
manpremas al si du maljunaj laboristoj minaj.
Dorson frapetas ili reciproke
kun varmaj kapsalutoj tre intimaj.
Ondiĝas pro ĝojrido eĉ la vizaĝsulkoj dum revido:

“Mi aŭdis, ke amiko venis ĵus de malproksim’,
tamen, neniu ja atendis vidi vin —
Martelon Huo!
Hej, mia kara,
kion vi faris dum la lastaj jaroj,
malkaŝas al mi klare viaj manaj kaloj.
Certe vi daŭre min-pioĉon manipulas,
alie, ili ja ne tiel duras!”

Interkroĉiĝas firme kiel hokoj
iliaj manoj, kaj paroloj
senĉese interfluas el la du koroj:
“En pasinteco,
pezis sur ni la tri montegoj*,
kaj nin sklavigis japanaj demonoj:
dum longaj, longaj tagoj,
ni, ĉiam en ŝvitado,
jen fosis ercon, jen formovis ŝtonojn,
vundiĝis de la ŝtalaj stangoj niaj manoj...
Kia indigno,
kia malamo!
Ardis en niaj koroj la furiaj flamoj!

“Ardis en niaj koroj la furiaj flamoj;
ni Kompartion sekvis firme kun fermitaj manoj.
Pri la taktik’ de ĝenerala striko
kunsidis ni ĝis la subir’ de Oriono;
kaj por disdono
de flugfolioj ni dekfoje riskis nin al faŭko de
demono!

Ĉar firme volis ni revolucion,
eĉ mort’ signifis por ministoj ja nenion!
Kaj tiutempe
admiris la ministoj,
ke Huo kaj Liu en la batalo
similas al martela paro.

“La paro da marteloj batis kun fervoro,
plenkore sekvis ni la Kompartion.
Kun la instru’ de Prezidanto Maŭ en la memoro,
kuraĝe sturmis ni eĉ incendion!
Por realigi lian instrukcion
ekrestis mi en Anŝan**,
kaj iris vi al Baŭtoŭ.**
Forpasis jam pli ol dek jaroj.
Kaj ĝis hodiaŭ,
ankoraŭ freŝas ni aktive en montaroj!

“En tiuj forpasintaj vintroj kaj someroj,
kiom da ŝipoj konstruiĝis kaj navigas trans la
maroj,
kaj da lokomotivoj ekcirkulis tra kamparoj kaj
montvaloj.
Kiom da belaj pontoj etendiĝis sur riveroj,
kaj da traktoroj kuras sur agraroj...
Kiom da ŝaktoj jam fosiĝis en montaroj,
kaj da altfornoj levis sin sur nia tero...

“Nun, progresadas per paŝegoj de giganto
kun ĉiu tag’ plibeliĝanta nia lando;
sed la atingoj jamaj ne montriĝas por ni konten-
tipe!

Kun Prezidanto Maŭ kiel voĝgvidanto,
kiel ni povus impetadi ne pli vigle?
Ja kiom multe ni deziris,
ke iutage dum revido,

*ni povu sidi ĉe pokaloj sur terlito,
por ĉion pridiskuti ĝis sateco:
Kiel produkti pli da erco?
Kiel maŝinojn pliefikigi
kaj la progreson de junuloj plie rapidigi?
Ĉu nia energio jam sufiĉe servas al nia patrio?..."*

*Jen ĉe la ŝakto sub la ruĝa suno,
mano-en-mano du maljunaj laboristoj minaj*

*marŝas senhalte, batakantante
sur la revolucia voj' konstante!*

*Aludo pri imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo.

**Ambaŭ estas niaj feraj-ŝtalaj bazoj, Anŝan en Liaŭning-provinco kaj Baŭtoŭ en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.



Atendi Perdinton en Pluvego

LASTATEMPE, en la tria mezlernejo ĉe Ĝongŝanmen de Tiangin cirkulas rakonto pri tio, ke lernantoj Kiu Juanming kaj Gaŭ Guoĝu trovis mansakon kaj redonis ĝin al la perdinto.

Iun tagmezon post lernohoro, Kiu Juanming kaj Gaŭ Guoĝu iris hejmen en pluvo. Subite ili trovis mansakon sur la vojo kaj ĝin levis. Malferminte ĝin, ili trovis en ĝi multe da bankbiletoj kaj varbiletoj. En la komenco ili volis doni la sakon al sia instruisto, sed poste ili pensis, ke la perdinto certe serĉas ĝin maltrankvile, tial ili decidis resti tie por atendi la perdinton.

La pluvo kaj vento pli kaj pli furioziĝis. Ili atendis pli ol unu horon kaj iliaj vestoj estis tramalsekigitaj, sed ne venis la perdinto. Spite al la pluvego kaj ventego, ili daŭre atendis ĉe la vojo.

Tion rimarkis policano Liang Baŭĝong deĵoranta ĉe proksima loko. Liang vokis ilin en la polican budon por scii, kio okazis al

ili, kaj lasi ilin sin ŝirmi de la pluvo. La lernantoj detale rakontis la aferon al Liang kaj profunde kortuŝis lin. La lasta zorgeme diris al ili: "Vi donu ĝin al la policejo ĉe Ĝongŝanmen, kaj mi ĉi tie atendos anstataŭe."

Tuj post la foriro de Kiu Juanming kaj Gaŭ Guoĝu, Liang Baŭĝong telefonis al ĉiuj deĵorantaj policanoj sur la Tiangin-Tanggu-a Ŝoseo, ke se ili trovos la perdinton de la mansako, ili sendu lin al la policejo ĉe Ĝongŝanmen por ĝin preni.

Kiam Liang Baŭĝong finis sian deĵoron, li detale prezentis la aferon al sia daŭriganto. Ĝuste tiam venis de la oriento du biciklantaj mezaĝuloj, kiuj maltrankvile kriis de malproksime: "Kamaradoj policanoj, ĉu vi vidis mansakon?"

Tion aŭdinte, Liang Baŭĝong tuj respondis ĝoje: "Jes. Ĝin trovis du lernantoj. Iru kun mi por rigardi." Kaj ili tuj biciklis al la policejo.

Tuj post kiam deĵoranto Li Gianhua akceptis lernantojn Kiu Juanming kaj Gaŭ Guoĝu en la policejo, li telefonis al la najbaraj policejoj por ilin informi pri la afero. Dume Liang Baŭĝong venis al li kune kun la mezaĝuloj.

La mezaĝuloj estas membroj de Dabiĝuang-komunumo. Ili estis senditaj de sia produkta brigado al Tiangin por aĉeti irigacian kaj drenan maŝinojn. Sur la vojo, ili perdis la mansakon, en kiu estas 280 juanoj, deponatesto kaj varbiletoj.

La deĵoranta policano parolis pri la nobla konduto de la du lernantoj. La komunumanoj tre kortuŝiĝis kaj laŭdis ilin: "Vi ja estas bonaj lernantoj nutritaj de Maŭzedongpenso. Ni dankas vin en la nomo de niaj komunumanoj."

Kiu kaj Gaŭ respondis: "Ni faris nur kion ni devis. Ni devas multe lerni de vi, onkloj komunumanoj."

Amika Vizito

Laŭ invito de la tablotenisaj asocioj de Kanado, Usono, Meksikio kaj Peruo, la Ĉina Tablotenisa Delegacio kun Ĝuang Zedong kiel estro kaj Li Menghua kaj Kian Dajong kiel vices-troj, faris amikan viziton kaj konkurson al tiuj landoj. Dum la vizitado, la delegacio estis varme kaj amike akceptata de la popolanoj de tiuj landoj. La vizitado pluapase akcelis la interkomprenon kaj amikecon inter la popolanoj kaj sportistoj de Ĉinio kaj tiuj landoj.



Amike interbabilas ĉinaj kaj kanadaj gesportistoj.

Ĝuang Zedong faras subskribon por spektatorino en Otavo.







Usonaj infanoj prezentas bukadojn al la ĉinaj gesportistoj.

Kun sloganoj en la ĉina lingvo, usonaj geamikoj varme bonvenigas la Ĉinan Tablotenisan Delegacion.






Dum sia vizito al la nova industria urbo Sahagun de Meksikio la delegacio ludis por tieaj laboristoj kaj oficistoj.



La ĉinaj sportistoj ludas por la lernant

En iu laborista familio de Sahagun, Ĝuang Zedong transdonas al la mastrino saluton de la ĉina popolo.





Ĝia mezlernejo en Limo de Peruo.



Ĉinaj sportistinoj manpremas kun peruaj laboristinoj.



La Ĉina Tablotenisa Delegacio en Usono

EN Usono, de la orienta marbordo ĝis la okcidenta, de la ankoraŭ frosta nordo ĝis la varmiganta sudo, ĉie la Ĉina Tablotenisa Delegacio ricevis varman bonvenigon kaj amikan akcepton de la lokanoj. Ĉu en la aŭtofabriko de Detrojto aŭ en Maryland-universitato de Vaŝingtono, ĉu en la konkursejo de Memphis aŭ sur la aerodromo de Los-Anĝeleso, la usonaj laboristoj, junuloj, studentoj, nigruloj, amikoj de diversaj rondoj kaj patriotaj transmaraj ĉinoj varme bonvenigis la delegitojn de la nova Ĉinio kun profunda amikeco al la ĉina popolo. Kaj nun en nia memoro ankoraŭ restas multaj kortuŝaj neforgeseblaj scenoj.

La 12-an de aprilo, la delegacio atingis la usonan urbon Detrojto de Miĉigano. Pri tio la usonanoj sentis en si grandan ĝojon. Iu amiko diris: “Estas honoro por nia urbo, ke vi eniris en Usonon tra Detrojto.” En la sekvinta tago, la ĉinaj sportistoj vizitis aŭtofabrikon. Kiam ili venis al ĝia enirejo,

multaj laboristoj kaj oficistoj de la fabriko jam atendis tie por bonvenigi la gastojn. En laborejoj, pendis multaj rubandoj kun la surskribaĵo: “Ni bonvenigas vin al Detrojto.” Laboristoj starantaj ĉe siaj postenoj salutis mansvingante al la gastoj. Iuj eĉ forlasis la laboron por manpremi kun la ĉinaj sportistoj. Sur kartono pendigita sur iu maŝino estas skribitaj en la ĉina kaj angla lingvoj: “Amikeco la unua, konkurso la dua”. La vortoj estis skribitaj de iu laboristo, kaj la ĉinaj ideografiaĵoj estis de li kopiitaj el la gazeto. Tiam li staris apud la maŝino kaj senĉese salutis la ĉinajn gastojn. La ĉinaj sportistoj esprimis sian varman saluton al la laboristoj. La estro de la delegacio Ĝuang Zedong diris al ili: “Saluton al la usona laboristaro. Ni venis por lerni de la usona laboristaro.” Sportistino Lin Hujking petis iun usonan laboristinon transdoni la salutojn de la ĉinaj sportistoj al ĉiuj laboristinoj de la fabriko. Kaj multaj usonaj laboristoj

petis transdoni iliajn salutojn al la ĉinaj laboristoj. Alia ĉina sportistino alpinglis insignon kun bildo de Tian-anmen-pordego sur la brusto de iu laboristo, kiu dankis ŝin kaj bedaŭris ke li ne havas donacon por tuj doni en respondo. Tiam la ĉina sportistino diris: “La plej bona donaco ja estas la amikeco de la usona popolo.”

En Ann Arbor, studentoj de Miĉigano-universitato kolektiĝis antaŭ la aŭditorio, manĝoĉambro kaj stadiono por atendi la ĉinajn vizitantojn malgraŭ pluvo. La universitato havas pli ol 30,000 studentojn. Ĉie en la vasta korto, kien iris la ĉinaj sportistoj, ili ricevis varman aplaŭdon. Dum manĝado en la manĝoĉambro, studentoj montris grandan deziron koni Ĉinion kaj multe demandis pri ĉinaj junuloj, virinoj kaj sportoj. Iu el ili diris: “Ni bonvenigas vin al Ann Arbor. Tiu ĉi estas bona ŝanco por rekta kontakto inter la usona kaj ĉina popoloj. Ni esperas ke vi vidos ke ni usonanoj konfidas kaj respektas la ĉinan popolon. Kaj dum via vojaĝo malproksime de via patrolando, nia varmeco vin akompanos.”

En Virginio situas kvietra urbeto Williamsburg, kie antaŭe estis gubernatora oficejo dum la regado de la anglaj koloniistoj kaj kiu ludis gravan rolon en la Usona Milito por Sendependeco. Kiam la ĉinaj sportistoj veturis al tiu urbeto, ĉie ili povis trovi amikajn esprimojn de la tiea popolo: iuj etendis siajn manojn el aŭtoj kaj aplaŭdis, aliaj mansvingis en siaj aŭtoj, kaj krome ankaŭ homoj starantaj en kampoj apud la ŝoseo mansalutis senĉese. La delegacio vizitis tie apotekon, hotelon, ventmuelejon, presejon kaj paperfarejon, kiuj estas postrestaĵoj de la 18-a jarcento. Kaj en la Instituto de Williams kaj Mary, unu el la plej malnovaj altlernejoj en Usono, la ĉinaj sportistoj prezentis pilkoludon por la studentoj kaj loĝantoj, kaj ricevis ilian varman bonvenigon.

La usona popolo esprimis fortan deziron pliigi sian komprenon pri kaj kontakton kun la nova Ĉinio. Ili rigardis tiun ĉi viziton kiel grandan eventon en konstruado de amikeco inter la du popoloj. Ĉiu el la kvin oficialaj konkursoj inter la ĉinaj kaj usonaj sportistoj havis kelkmil, iufoje eĉ dekmil, spektatorojn. Respondeculo de iu sporthalo en Detrojto diris, ke ĉiuj enirbiletoj estis jam forvenditaj, apenaŭ la Ĉina Tablotenisa Delegacio atingis Kanadon. Multaj el la usonaj amikoj diris, ke estas ja la unua fojo en Usono, kiam iras tiom grandioza tablotenisa konkurso. Kaj post ĉiu ludo la spektatoroj dumlonge ne volis foriri kaj multaj

el ili kuris al la ĉinaj sportistoj por gratuli ilin kaj peti iliajn subskribojn.

Profunda amikeco estis starigita inter la ĉinaj kaj usonaj sportistoj, kiuj kune vivis kaj reciproke lernis dum la vizitado de pli ol du semajnoj. Ili ĉiam kune ekzercis. En Memphis apud la Misisiporivero, sportistoj de ambaŭ landoj speciale interŝanĝis sperton en tablotenisa tekniko. La ĉinaj sportistoj detale konigis sian sperton kiel fari starton kaj ofensivon kaj serioze faris prezentadon al la usonaj sportistoj, kaj ĉi tiuj laŭdis ilian bonan manieron. La ĉinaj sportistoj laŭdis la lernemon de la usonaj sportistoj.

Kiel delonge sopiratan ĝojindaĵon, la patriotaj transmaraj ĉinoj en Usono rigardis la viziton de la Ĉina Tablotenisa Delegacio. Kiam la delegacio atingis Detrojton, ĝi ricevis ilian varman bonvenigon. Jam estis profunda nokto, kiam la delegacio atingis sian hotelon en Vaŝingtono. Tamen, kelkdek patriotaj transmaraj ĉinoj delonge atendis ilin kun alte tenata rubando kun jena surskribo: “Bonvenon al niaj karuloj de la patrolando!” En Novjorko, Los-Anĝeleso kaj San-Francisko, en kiuj loĝas plej multe da transmaraj ĉinoj, la ĉinaj patriotaj elmigrintoj faris multajn preparojn por bonvenigi la delegacion. Sur la aerodromoj de Los-Anĝeleso kaj San-Francisko, centoj da bonvenigantaj transmaraj ĉinoj ilin bonvenigis kun la kvin-stela ruĝa flago de la Ĉina Popola Respubliko kaj portretoj de Prezidanto Maŭ, laŭte kantante *Ruĝas la Oriento* kaj *Marnavigo Dependas de Stiristo* kaj aliajn revolucionajn kantojn. La patriotaj transmaraj ĉinoj de San-Francisko speciale faris amuzajn aktivadojn kun la ĉinaj sportistoj. Iu ĉino longe loĝanta en Usono diris kun emocio: “Ni sopiris kaj atendis pli ol dudek jarojn, kaj hodiaŭ ni fine vidis karulojn el la granda socialisma patrolando.” Kaj iuj maljunaj elmigrintoj forte manpremis kun la ĉinaj delegitoj, elverŝante al ili siajn korajn vortojn. Kaj dum parolo varmaj larmoj plenigis iliajn okulojn.

La vizitado de la ĉina delegacio dum tre mallongaj 18 tagoj de la 12-a ĝis la 29-a de aprilo, profunde impresis multajn usonajn amikojn. Iu mezaĝa usona virino skribis en sia letero al la delegacio: “Kiel bone estus se mi povus paroli en la ĉina lingvo. Tiam mi povus rekte interparoli kun vi. Sed eĉ tiam, mi ankoraŭ ne povus plene esprimi la profundan amikecon kaj bonajn dezirojn de mi mem, mia familio kaj la superega plimulto de miaj samlandanoj.” Tiuj vortoj esprimis la komunan volon de la ordinaraj popoloj de Usono: La usona popolo bonvenigas la reprezentantojn de la nova Ĉinio!

La Japana Popolo Estas Netrompebla

EN la lastaj jaroj, la usonaj kaj japanaj reakciuloj ĉiam ludis farson de t. n. "redono de Okinavo". Je la 15-a de majo 1972, tiu farso oficiale sursceniĝis en Tokio.

OKINAVO ESTAS UNU EL LA PLEJ GRANDAJ AGRESAJ MILITAJ BAZOJ DE USONO EN AZIO

Okinavo-insularo, la ĉefa insularo de Rjukiju-insularo, situas en la okcidenta Pacifiko kaj enhavas pli ol 60 insulojn kun areo de pli ol 2,300 kvadrataj kilometroj kaj 970,000 loĝantoj. Naha estas ĝia plej granda urbo.

En junio 1945, la usonaj trupoj okupis Okinavon. La San-Franciska Traktato de Paco kontraŭleĝe subskribita de Japanio kaj Usono en 1951 kondiĉis, ke Japanio konsentas meti Okinavon sub la kuratorcon de Usono. En junio 1957, la usona Eisenhower-registaro deklaris, ke Usono prenas ĉiujn "rajtojn" super Okinavo inkluzive de administrado, leĝdono kaj jurisdikcio.

Sur Okinavo-insularo estas pli ol 140 militaj bazoj kaj instalaĵoj de Usono kaj pli ol 50,000 usonaj armeanoj ekipitaj per telestirataj raketoj, nukleaj kapoj, bakteriaj kaj kemiaj armiloj kaj aliaj. La usona imperiismo jam faris Okinavon unu el siaj plej grandaj agresaj militaj bazoj en Azio.

La Okinavaj reprezentantoj manifestacias en Tokio. Ili firme decidis ĝisfine disrompi kune kun aliaj japanaj popolanoj la kontrakton pri "redono" de Okinavo.



Post longdaŭra batalo de la japana popolo (inkluzive de la okinava) por repreni Okinavon, la usona registaro redonis malgraŭvole al Japanio la "administradon" super Okinavo. Sed la japana registaro ankoraŭ permesis, ke Usono senlimdate tenas 87 gravajn militajn bazojn kaj instalaĵojn, kiuj okupis ĉ. 12% de la totala areo de Okinavo. Krome, la japana registaro disponigas al Usono dekojn da maraj kaj aeraj zonoj kaj garantias absolutan liberon de agado al la usonaj trupoj en Okinavo. Evidente, la t. n. redono efektive signifas, ke la usona okupo de Okinavo estas "legitimita".

Post la redono, Okinavo ankoraŭ estas pontkapa blokhaŭso de la usona imperiismo por agreso en Azio. Kaj tion pruvis historiaj faktoj: Utiligante la militajn bazojn de Okinavo, la usona imperiismo senĉese faras subfosajn, intervenajn kaj agresajn aktivadojn kontraŭ Ĉinio, Koreio, Vjetnamio kaj aliaj aziaj landoj. James B. Lampert, la alta komisararo de Usono en Okinavo, deklaris lastatempe, ke la reto de militaj bazoj de Usono en Okinavo "plue ludos ekstreme gravan rolon en strategio". Efektive, Usono ĉiam uzas siajn marajn kaj aerajn bazojn de Okinavo por plifortigi la agresan militon kontraŭ Vjetnamio kaj Hinduĉinio. El tio oni povas vidi, ke la "redono de Okinavo" preparolata de la usonaj kaj japanaj reakciuloj estas falsa, kaj la vera celo estas "legitimi" la usonan okupon de Okinavo.

Estas necese montri, ke dum la "redono de Okinavo" la usona kaj japana registaroj senskrupule metis la ĉinan teritorion de Diaŭju kaj aliaj najbaraj insuloj en la "redonatan zonon". Tio estas serioza ago de agreso al ĉina teritorio kaj suvereneco. En la 30-a de decembro 1971, la Ministerio de Eksteraj Aferoj de la Ĉina Popola Respubliko montris en sia deklaro per multaj faktoj, ke de antikveco Diaŭju kaj aliaj najbaraj insuloj estas teritorio de Ĉinio, ĉies ajn intrigo por engluti ĉinan teritorion neniam povos sukcesi. Je la 20-a de majo 1972, Huang Hua, la konstanta delegito de la Ĉina Popola Respubliko al UN skribis leteron al la ĝenerala sekretario kaj prezidanto de la Konsilio de Sekureco de UN. Li montris en la letero, ke estas tute kontraŭleĝa kaj senvalida tio, ke la usona kaj japana registaroj prenas la ĉinan teritorion de Diaŭju kaj aliaj najbaraj insuloj por sekreta negoco. La registaro kaj popolo de Ĉinio neniam akceptos tion.

Je la 15-a de majo, la usona vicprezidanto S. T. Agnew kaj la japana ĉefministro Eisaku Sato persone ĉeestis la celebran ceremonion por "redono de Okinavo" okazigitan en Tokio kaj bombaste propagandis "novan vivon" de Okinavo. Tamen, ĝuste en la sama tago, centmiloj da popolanoj de Okinavo kaj Japanio okazigis grandiozajn protestajn kunvenojn kaj manifestaciojn kaj per tio levis novan tajdon por oponi kontraŭ la trompado pri "redono de Okinavo".

En la 15-a de majo, ĉ. 200,000 laboristoj de pli ol 800 laboristaj sindikatoj de 17 industriaj branĉoj en la tuta Japanio okazigis strikon de 30 minutoj ĝis 24 horoj, kaj strikis ankaŭ studentoj de 46 universitatoj. Dekmiloj da popolanoj de Okinavo kunvenis en 18 lokoj. Laboristoj de du ĵurnaloj de Naha kaj 25,000 urbanoj kunvenis en Jogi-parko de tiu urbo spite de pluvo. La manifestaciantoj postulis malkonstruon de la usonaj militaj bazoj en Japanio kaj kompletan redonon de Okinavo kaj oponis kontraŭ tio ke la usona imperiismo plifortigas la agresan militon kontraŭ Vjetnamio utiligante la okinavajn bazojn.

La volo de la japana popolo por postuli kompletan redonon de Okinavo al Japanio estas neofendebbla. Tio estas taga sonĝo, ke Sato kaj la similaj intencas nuligi la batalon de la japana popolo por senkondiĉa kaj kompleta repreno de Okinavo. Kaj la japana popolo nepre daŭrigos la batalon por efektiva repreno de Okinavo ĝis la kompleta venko.



USONAJ JUNULOJ MANIFESTACIIS KONTRAŬ MILITO


Post la manifestacio de pli ol 10,000 usonaj poloj de Vaŝingtono en la 21-a de majo por oponi kontraŭ milito, ĉirkaŭ 1,000 usonaj junuloj de tiu urbo faris protestan manifestacion je la 22-a de majo por forte oponi kontraŭ nova eskalado de la agresa milito de la usona registaro kontraŭ Vjetnamio.

La partoprenantoj manifestaciis ĉirkaŭ Pentagono. Ili ankaŭ voĉlegis notojn pri militaj krimoj fare de la usona imperiismo kontraŭ la vjetnama popolo kaj la aliaj popoloj de Hindoĉinio.

5,100,000 SENLABORULOJ EN USONO EN MAJO

En la komenco de 1969 la procento de la usonaj senlaboruloj atingis 3.5, sed tiu en la lastaj jaroj senĉese kreskis pro tio ke la usona monopola burĝaro persiste antaŭenpuŝas politikon de agresa milito kaj ekspansio. Kvankam la usona registaro multfoje promesis "plenan dungigon", tamen la procento de la senlaboruloj en la pasintaj 19 monatoj ĉiam restis tre alta. La meznombra procento de la senlaboruloj de la tuta jaro 1971 estis 5.9, t.e. la plej alta en la lastaj dek jaroj.

Bostonaj amasoj de Usono manifestacias por protesti kontraŭ la disvastigo de la agresa milito de la usona registaro kontraŭ Vjetnamio.



VENEZUELANOJ SUBTENAS IRAKON EN ĜIA BATALO KONTRAŬ SUBPREMADO DE FREMDLANDAJ OLE-KOMPAŬIOJ

70 venezuelaj liberalaj profesiuloj montris en sia kuna deklaro, ke la landoj de la tria mondo devas subteni Irakon en ĝia alprenado de rimedoj por defendi siajn laŭlegajn rajtojn kaj oponi kontraŭ ĉantaĝo de fremdlandaj ole-kompanioj.

La Plenuma Komitato de la Unueca Centra Unio de Venezuelaj Laboristoj sendis telegramon al la Ĝenerala Federacio de Irakaj Sindikatoj, en kiu ĝi esprimis sian subtenon al la iraka popolo en ĝia batalo kontraŭ la fremdlandaj petrolaj plutokratoj kaj sian kredon, ke la iraka popolo certe akiros finan venkon en la batalo.

LA ĈINA PAVILONO EN LA INTERNACIA FOIRO AKCEPTIS PLI OL 800,000 VIZITANTOJN

Vespere de la 29-a de majo 1972 fermiĝis la Budapeŝta Internacia Foiro. Ĝin vizitis ĉirkaŭ miliono da homoj. Dum irado de la foiro, la ĉefministro de la hungara registaro Fock Jenő k.a. vizitis la ĉinan pavilonon. La ĉina pavilono akceptis sume pli ol 800,000 vizitantojn. Multaj hungaraj vizitantoj diris, ke post rigardo al la ĉina pavilono ili havis pli da kompreno pri Ĉinio kaj esperas, ke senĉese disvolviĝos la amikeco inter la popoloj de Hungario kaj Ĉinio.

Sur la Kovrilo:

Maljuna stabllaboristo Vang Ĝenja (la unua de dekstre) estas fama teknika renoviganto de 3603-fabriko. Li projektis kaj sukcesis ellabori kune kun aliaj laboristoj kaj teknikistoj maŝinon, per kiu ili plialtigis la laborefikon pli-ol-duoble, kaj multe plirapidigis la produktadon de petrolaj cisternoj.

Sur la Dorskovrilo:

La Ĉina Belarta Halo, en kiu okazis somere de la kuranta jaro la tutlanda ekspozicio de artaj verkoj, memore al la 30-a datreveno de la publikigo de la verko de Prezidanto Maŭ "Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an". Montriĝis en tiu ekspozicio pli ol 270 eminentaj verkoj kreitaj de post la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio.



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 8 (169) 1972


Ĉefa Enhavo

| | |
|---|----|
| ĈPLA Lernas de la Tutlanda Popolo | 1 |
| Heredigi Bonan Tradicion | 4 |
| Klara Fonto sur Insuleto | 7 |
| Ju Huahu kaj Ĝaŭ Ŝoŭfu — Lertaj Batalantoj per Minoj | 9 |
| La Ekspozicio de Belartaj Verkoj | 13 |
| La Grundo-malleviĝo de Ŝanhajo Estas Fundamente Regata | 17 |
| Bredi Fiŝojn en Malpura Akvo | 22 |
| Elefantino "Banna" | 26 |
| Mebloj el Malmola Ligno | 30 |
| La Infanaĝo de Olunĉunoj | 31 |
| Sur la Vojo de Kombiniĝo kun Laboristoj kaj Kam- paranoj | 33 |
| Por Sekura Produktado de Karbominejo | 35 |
| Ĝoja Revido (poemo) | 38 |
| Atendi Perdinton en Pluvego | 39 |
| La Ĉina Tablotenisa Delegacio en Usono | 43 |
| La Japana Popolo Estas Netrompebla | 45 |


Nova Fizionomio de Agrikultura kaj Akvoutiliga Konstruado



La popolo de Jongĉeng-gubernio de Henan-provinco konstruis akvutiligan sistemon por irigacio kaj dreno laŭlonge de Tuohe-rivero en la baseno de Huajhe-rivero. Ĉi tio estas Gangkiaŭ-kluzego sur Tuohe-rivero.




Komunumanoj de Gjundu-brigado de Liulin-gubernio de Ŝanhi-provinco konstruis ŝtupkampojn por teni akvon kaj loeson.





Ĉen Jongguj (la antaŭa), sekretario de la partia filio de Daĝaj-brigado de Hijang-gubernio de Ŝanĥi-provinco, konstruas novan kampon kune kun komunumanoj.

Vastaj amasoj de armeanoj kaj popolo de Vejjuan-gubernio kaj Zigong de Siĉuan-provinco finkonstruis Ĉangŝaba-akvorezervejon kun barajo alta je 52 metroj kaj kapacito de 38,000,000 kubmetroj.



Sinapogante sur la propraj fortoj, Liukjuan-komunumo de Tongŝan-gubernio de Ĝiangsu-provinco konstruis Ĥiangjang-kanalon kun longeco de 20 kilometroj tiel ke miloj da muoj da kampoj ŝangiĝis en rizkampojn.



Komunumanoj de diversaj nacioj de Kinghaj-provinco en la supra parto de la Flava Rivero utiligas akvan fonton por produkti elektron kaj irigaci kampojn. Tio ĉi estas parto de la kanalo de la elektra irigacia sistemo de Cuanŝujdi.





Aktiva konstruado de malgrandaj hidroelektraj de Jongĉun-gubernio de Fugian-provinco stimulas la disvolviĝon de agrikultura produkto. Jen komunumanoj instalas akvotubon por hidroelektra stacio.



Sur la sekunda Nordorienta Ebenejo, oni jam vaste aplikas traktoron kaj rikoltmaŝinojn. Traktoroj de Boluopu-komunumo de Jingkou-gubernio de Liaoning-provinco profunde plugas terenon.

Pajlaj Plektajoj

de Ŝandong-provinco





大的領袖毛主席萬歲

中國美術會

全國美術作品展覽會